

1978 oktobro

71-a jaro

n-ro 874 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Lumurbo por la 64a UK en 1979

Vi trovos

ke la enkonduka teksto de ĉi tiu numero prezentas la komitatan decidon doni al la ĉi-jaraj zamenhofaj festoj apartan karakteron kaj ligi ilin al la trideka datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu decembra Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto povus doni al la tuta movada informa laboro la necesan akcenton de aktualeco aŭ moderneco, se vi preferas tian esprimon. Neŭtrala internacia komunikilo estas mem unu el la bazaj homaj rajtoj, ĉar preskaŭ ĉiuj aliaj homaj rajtoj bezonas lingvon por esprimiĝi aŭ plenumiĝi. Se ni tiel rigardas la aferojn, ni prave konkludas, ke Esperanto mem estas homa rajto kaj, ke esperantistoj apartenas al la plej malnovaj batalantoj por la homaj digno kaj rajtoj. Ni do publike montru nian fieron pri tio. La studo pri Tolstoj estas atente leginda; ĝi enhavas multon novan kaj gravan. La raporto pri la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj faras plurajn interesajn konstatojn kaj starigas kelkajn gravajn demandojn. Cetere, kial ni diru ĉion al vi? Legu mem, ĉar vi supozeble tiucele ja abonas la revuon!

Enhavo

- 169 UEA deklaras Semajnon de Homaj Rajtoj kaj Esperanto: Aparta karaktero por la ĉi-jaraj Zamenhof-festoj (Humphrey Tonkin)
- 170 Japanaj esperantistoj en Ĉinio: Ĉu revigliĝas la ĉina Movado? (Joŝimi Umeda)
- 171 "Renmin Ribao" pri Esperanto
- 172 Lev Tolstoj kaj la Internacia Lingvo: Apogo pro profunda konvinkiĝo (Boris Kolker)
Nekrologoj: L. Tárkony 1902-1978 (V. Benczik); S. Nishi 1885-1978
- 174 Nova Honora Membro: Ŝiĥej Mijake
- 176 Belartaj Konkursoj 1978: Pesimismo povas esti pozitiva (B. Ragnarsson)
Originala poezio, Unua premio: Poemoj sen titolo (Kris Long)
- 177 Originala poezio, Dua premio: La merlo (Rejna de Jong)
Plia premio por Mauro Nervi
- 178 Belartaj Konkursoj 1979: Porinfana literaturo
- 179 Recenzoj: "La trofeoj; La sonetaro" (Petar Stefanović); "Elektrolitoj" (Rob Vetter); "Esperanto, rivoluzione della parola" (D.B. Gregor)
- 181 TEJO-paĝo: Brita sekcio de TEJO: Feniksa fenomeno (Ian Jackson)
Laborkapacita zorgo (S. MacGill)
- 182 Kongresa komuniko — informoj pri la 64a UK en Lucerno venontjare
- 184 Laste aperis (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 185 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 186 Kotiztabelo de UEA por 1979
- 187 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
Ekzameno E (Bernard Golden)
- 188 Anoncetoj; Anonco.

La kovrilo

Etimologio — tiu bela lingvistika branĉo kun aparta rakonto pri ĉiu vorto — ligas la nomon de Lucerno al la lumo. Kiu foje estis tie, scias, ke la nomo "Lumurbo" tute bone konvenas al la loko lagoborda. Aliaj pri tio konvinkiĝos venontjare dum la 64a Universala Kongreso. La "Akvo-Turo" kaj la "Kapel-Ponto", kiuj ĉefrolas en nia kovrila foto, estas simboloj de Lucerno, kies malnova pitoreska parto fonas en la bildo. Sed, ni ankoraŭ intense travivas la efikojn de Varno, kaj jen, ni jam parolas pri Lucerno?! La du kongresoj certe montriĝos tre malsimilaj, eble eĉ antipodaj, kvankam la du urboj havas fortan komunan trajton — ili estas turismaj ĉefurboj de la du landoj. Ne kongresi en urbego, tio havas siajn klarajn avantaĝojn. Ni tion spertis en Rejkjaviko kaj Varno; ni spertos tion en Lucerno. En tiaj lokoj niaj kongresoj havas eblecon de maksimuma publika efekto.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265, 1/4p. 145, 1/8p. 85, 1/16p. 55 gld. Nemovadaj komercaj entreprenoj pagas duoble. Anoncoj sur la ekstera kovrilpaĝo kosta duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj la Financa Programo: d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; telefono (215) 259 8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri informado kaj kulturo: mag. William Auld, 20 Harviestoun Road, Dollar, Clacks., FK14 7HG, Britio; telefono (02594) 2339.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado kaj la delegita reto: prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; telefono (02) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Estrarano pri landa kaj regiona agado: s-ino Ursula Grattapaglia, Caixa Postal 04-0097, BR-70000 Brasília, Brazilo.

Estrarano pri administrado, financoj kaj specialaj taskoj: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; telefono (050) 35 49 35.

Estrarano pri edukado: s-ro Andrzej Pettyn, skr. poczt. 46, PL-05-710 Milańówek, Pollando; tel. 58-37-08.

Estrarano pri kongresoj kaj turismo: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; telefono (072) 16 725.

Aparta karaktero por la ĉi-jaraj Zamenhof-festoj

LA UNIVERSALA DEKLARACIO de Homaj Rajtoj akceptiĝis en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10an de decembro 1948. Sekve, en 1978 oni festas la tridekan datrevenon de la Deklaracio.

Por rekoni tiun datrevenon, Unesko organizis en septembro ĉi-jare internacian Kongreson pri la Instruado de la Homaj Rajtoj, en Vieno. Ankaŭ UEA partoprenis tiun kongreson pere de oficiala reprezentanto, d-ro Leopold Grimme.

Tra la tuta periodo de post 1948, Universala Esperanto Asocio eksplicite aplikis la principojn de la homaj rajtoj en sia agado. "Respekto al la homrajtoj" estas, laŭ ĝia Statuto, "esenca kondiĉo" por la laboro de la Asocio. Tia emfaza aludo al la homaj rajtoj estas relative rara en la statutoj de neregistraj asocioj.

UEA kontribuis al la Jaro de Homaj Rajtoj en 1968 per aparta atento al la rajto je lingva egaleco, kaj per tre ampleksa programo de agado, kiu inkluzivis pritrakton de la homaj rajtoj en la tiujara Universala Kongreso de Es-

peranto, aperigon de multaj artikoloj en Esperanto-periodaĵoj, aperigon de artikoloj verkitaj de parolantoj de Esperanto, aŭ tradukitaj el Esperanto, en neesperantaj gazetoj, kaj publikigon de pluraj apartaj eldonaĵoj.

kontiĝo de specialistoj de Unesko, kiu traktis la historiajn originojn de rasismo. La reprezentanto de UEA, d-ro J.C. Wells, havis okazon interveni por emfazi la proksiman ligon inter la rasa kaj lingva diskriminacioj. Pluraj dokumentoj pri la homaj rajtoj aperis en Esperanto, inkluzive afiŝan serion de Unesko kaj Esperantan tradukon de la Universala Deklaracio. En 1976 UN mem eldonis represon de tiu traduko, kaj en 1977 Unesko aperigis en Esperanto la Rekomendon pri Edukado por Internacia Kompreniĝo. Inter sia apero fine de 1977 kaj la mezo de 1978, la Rekomendo atingis pere de sia Esperanta traduko certe pli ol dudek mil homojn en pli ol 80 landoj.

Dum la 63a Universala Kongreso de Esperanto, la Komitato de UEA akceptis laborplanon pri la festado de la trideka datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĝi antaŭvidas, ke en decembro de la nuna jaro okazos speciala semajno de homaj rajtoj, dum kiu la parolantoj de Esperanto, per kunsidoj, renkontiĝoj kaj publikaj deklaroj festos la akceptiĝon de la Deklaracio.

La 10a de decembro estas dimanĉo. La postan vendredon la Esperanto-movado festos la Zamenhof-tagon, datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof en 1859. UEA proklamas la periodon inter tiuj du datoj — Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto. Tiu ligo de la personeco de Zamenhof al la koncepto de la homaj rajtoj estas logika, taŭga kaj digna kunligo.

Kompreneble la celo de la Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto ne estos nur informadi eksteren aŭ nur ĝenerale festi. Ĝi celos ankaŭ doni al niaj membroj la instigon studi la Universalan Deklaracion, tiel edukante sin mem.

Kion niaj lokaj organizantoj povas fari? Jen kelkaj sugestoj:

Unue, dediĉu la kunsidon de via loka grupo dum tiu semajno al la temo "La Homaj Rajtoj kaj Esperanto". Donu apartan atenton al la teksto de la Deklaracio, kaj en via kunsido eventuale faru mallongan prezenton de la diversaj aspektoj de tiu teksto. Okazigu diskuton pri la implicoj de la Deklaracio, konsiderante ĝin kiel tuton. Ĉu ĉiuj ĝiaj artikoloj estas facile kongruigeblaj unu kun alia, ĉu la apliko de unu rajto malhelpas alian? Kion diras la Deklaracio pri komunikado, kaj precipe lingva komunikado? Kiel la Deklaracio rekte rilatas al la agado de esperantistoj? Due, donu atenton al la vivo de Zamenhof. Li forpasis jam longe antaŭ la Universala Deklaracio, sed lia vivo respegulis ĝiajn principojn. Kion lia vivo povas instrui al ni pri la praktika apliko de la



Esperantistoj en la 63a UK ĉi-jare: La impona vico de la movadaj kongresoj estas fakte vico de publikaj manifestacioj pri la lingva aspekto de la homaj rajtoj.

La Asocio kontribuis kaj kontribuas ankaŭ al pluraj aliaj kampanjoj de UN kaj Unesko, kiuj rilatas al la homaj rajtoj, inkluzive la Jardekon de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismen kaj Rasan Diskriminacion. En julio ĉi-jare, en Montrealo, UEA estis reprezentita en ren-

homaj rajtoj? Kiel liaj idealoj esprimiĝu en la nuna epoko?

Eventuale, via loka grupo povus okazigi publikan kunsidon — do ne pridiskuti tiujn ĉi temojn en la Internacia Lingvo, sed malfermi la kunsidon al la ekstera publiko kaj paroli en nacia lingvo. Se vi tion farus, vi povus utiligi la propran scion pri la Universala Deklaracio (preskaŭ certe pli detalan ol tiu de la neesperantista publiko) por eduki viajn kuncivitanojn kaj montri al ili kiel per la Esperanto-vivo oni konatiĝas kun la internaciaj valoroj kaj principoj de la homa vivo. Kaj same, vi povos ligi la vivon de Zamenhof al via prezento, tiel montrante, ke Esperanto mem esprimas la valorojn entenatajn en la Universala Deklaracio.

Tute sendepende ĉu vi faros publikan kunsidon aŭ pridiskutos la Deklaracion en Esperanto, vi nepre informu vian lokan gazetaron per taŭga komuniko antaŭ kaj post la kunsido. Se temos pri publika kunsido, la gazeto ricevu apartan inviton. Ĉiu ĵurnalisto ricevu ekzempleron de la Deklaracio en Esperanto kaj prefere ankaŭ en la propra lingvo.

Nepre informu ankaŭ vian nacian Unesko-komisionon pri via kunsido. Faru tion per digna letero en via nacia lingvo, kiu modere kaj dece emfazu, ke la ligoj inter la Deklaracio kaj la agado por Esperanto estas fortaj. Menciu ankaŭ, ke vi organizis tiun kunvenon konforme al la decido de UEA nomi la tagojn tuj post la datreveno de la subskribiĝo Semajno de Homaj Rajtoj kaj Esperanto. Klarigu, ke UEA estas organizo en konsultaj rilatoj kun Unesko, kiu tiel helpas Uneskon atentigi la publikon pri la graveco de la Deklaracio.

Inter la aliaj decidoj de UEA lige kun la Datreveno estas aperigo de speciala dokumento en la serio *Esperanto-Dokumentoj*. UEA planas eldoni ankaŭ bazan artikolon pri la datreveno kaj konsilaron por la organizantoj de lokaj eventoj. Por ricevi ekzemplerojn, funkciojn de lokaj grupoj aŭ redaktoroj de Esperanto-gazetoj skribu al la Centra Oficejo.

Ĉi-jare, viaj Zamenhof-festoj havu sian apartan karakteron: ili memorigu ne nur la aŭtoron de la Internacia Lingvo sed ankaŭ la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj.

Humphrey Tonkin

JAPANAJ ESPERANTISTOJ EN ĈINIO:

Ĉu revigliĝas la ĉina Movado?

DEK DU JAPANAJ ESPERANTISTOJ vizitis Ĉinion inter la 18a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro 1978. La grupo estis nomita "Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de *El popola Ĉinio*", kaj konsistis el 6 inaj kaj 6 viraj membroj, sub la gvido de s-ro Rokuro Tokuda, unu el la japanaj perantoj de ĉinaj eldonaĵoj.

La celo de la grupvizito estis duflanka — amikeco kaj turismo. Ni renkontis multajn esperantistojn, veteranajn kaj junajn, en Pekino kaj Ŝanhajo. La duan tagon post nia alveno en Pekinon, Ĉina Esperanto-Ligo invitis nin al bankedo, en kiu ni intervidiĝis kun la gvidantoj de la ĉina Esperanto-movado, nome, s-roj: Hujucz, prezidanto de ĈEL, Ĵelezo, vicprezidanto, Ĉen Juan, ĝenerala sekretario, Ĉen Ĉi-ĉen, konstanta komitatano, kaj aliaj en la Esperanto-movado konataj malnovaj aktivuloj, kiel s-roj Tikos, Cicio Mar, Orverda, Ivanko kaj aliaj. Tiun saman tagon ni gustumis la faman pekinan anason laŭ la invito de Guozi Shudian, Internacia Libroservo de Ĉinio, kune kun aliaj esperantistoj. La bankedon sekvis ankoraŭ alia renkontiĝo kun junaj geesperantistoj.



En Ŝanhajo ni havis grandan honoron renkontiĝi kun la elstara verkisto kaj gvidanto de Ĉina Kultura Ligo, s-ro Bakin, kiu mem estas malnova esperantisto kaj iama redaktoro de *La verda lumo*. Kiel lulilo de la ĉina Esperanto-movado, Ŝanhajo ankoraŭ tenas sian torĉon de la internacilingva agado pere de tiuj veteranoj, kiel s-roj Ŝien Ŝi-gia, Liu Hua-cu, Pan Di-ŝo, kaj aldone ju-

na reprezentanto s-ro Ŝua Da-gi, kun kiuj ni povis amike konversacii pri diversaj laboroj malnovaj kaj novaj faritaj de ili. Tiamaniere, ni profitis la viziton plene por revarmigi kaj nove firmigi la amikajn rilatojn inter la ĉina kaj japana esperantistaro, povinte renkonti multajn ĝis nun malofte priaŭditajn malnovulojn kaj interparoli kun dekoj da relative novaj esperantistoj.

Krome, ni estis vere feliĉaj, ke ĉi-foje ni povis viziti en Pekino la oficejojn de la diversaj ŝtataj instancoj en kiuj Esperanto estas oficiale uzata, nome, la Redakcio de *El popola Ĉinio*, Esperanto-sekcioj de Radio Pekino, Fremdlingva Eldonejo kaj Guozi Shudian. Dum tiuj vizitoj kaj renkontiĝoj ni konstatis plian progreson de la per-Esperanta agado en Ĉinio, ĉar en tiuj ŝtataj laboroj entute okupiĝas ĉirkaŭ 40-50 esperantistoj kiel konstantaj laborantoj. Menciindas, ke tiuj kvar labor-



Japanaj kaj ĉinaj esperantistoj en Nankino: Ne nur turismo kaj amikeco sed ankaŭ ebleco por informiĝi kaj lerni.



Bakin, unu el la plej famaj ĉinaj esperantistoj, reaperas post multjara foresto de la movada scenejo: Maldekstre li interparolas kun la gvidanto de la japana grupo, kaj dekstre aŭtografas memoraĵon. Li estas tre elstara publika figuro en Ŝanhajo.

grupoj funkcias kiel paralelaj organizoj, en rilato interkonsiliĝa, sed neniel en la rilato de gvidanto kaj gvidato. Ĉio ĉi montras, ke en la lastatempaj gvidprincipoj de la ĉina vivo Esperanto okupas ankoraŭ pli elstaran pozicion lige kun la informa agado pri la lando. Ĉina Esperanto-Ligo, kiu dum pli ol jardeko restis pasiva en siaj funkcioj, ekkomencas reorganizi la esperantistojn tra la lando; tiel mi aŭdis.

Pri la alia celo de nia vojaĝo — turismo: La vizito efektiviĝis dank' al la prizorgo de Guozi Shudian, ĝenerala distribuanto de *El popola Ĉinio*, kiu transprenis sur sin la respondecon pri ĉiuj necesaj formalizaĵoj por nia vojaĝo, kunlaborante kun la Internacia Turisma Servo de Ĉinio. Speciale menciindas, ke kvar gesinjoroj, tri el Guozi Shudian kaj unu el la Redakcio de *El popola Ĉinio*, akompanis kaj helpis nin dum la tuta vojaĝo. En bona kaj akurata aranĝo de la Turisma Servo, ni vizitis kvar allogajn urbojn: Pekino, Nankino, Ŝanhajo kaj Hang-ĝoŭ. Ĉie ni estis varmege bonvenigitaj de la ĉina popolo ĝenerale. Ni estis gviditaj al diversaj lokoj: popolana komunumo, laborista loĝkvartalo, geknaba palaco, industria ekspozicio, lernejoj, fabrikoj de teksaĵoj, artaĵoj, diversaj vivnecesaĵoj, kaj aliloke. Ne mankis vizitoj al kulturvaloraj vidindaĵoj, malnovaj kaj novaj.

Naŭ el nia grupo vizitis Ĉinion por la unua fojo. Mi mem estis tia unuafoja vizitanto kaj havis tre freŝan impreson pri la lando najbara al la mia. Reveninte hejmen mi rimarkis, ke multaj japanoj, precipe esperantistoj, interesiĝas pri Ĉinio, kaj do mi komencis rakonti al ili tion kion mi vidis kaj spertis tie. Mi scias, aliflanke, ke esperantistoj en diversaj partoj de la mondo ankaŭ havas intereson informiĝi pri ĉiuj aspektoj de Ĉinio, inkluzive de esperantista laborado. Tiu scivolemo pli kaj pli estos kontentigata per diversaj manieroj, ekzemple per pli interesaj artikoloj en *El popola Ĉinio*, per radio-elsendoj kaj simile.

Fine, mi volas mencii la fakton, ke ni estis mirigitaj pri la rapida ekposedo de la esperant-lingva dialogo fare de geaktoroj en la Ĉina Pupteatra Trupo, kies altnivelan

provprezenton de *Ribelo kontraŭ ĉiela palaco* ni povis plene ĝui kaj aprezi en la vespero antaŭ nia forveturo al Tokio. Mi ne dubas, ke ilia prezentado en Zagrebo ĉe la Pupteatra Internacia Festivalo, komence de oktobro, ja estos sukcesa.

Jošimi Umeda

"Renmin Ribao" pri Esperanto

GRAVA TRAJTO de la Universala Kongreso en Varno estis la partopreno de kvarpersona delegacio el Ĉinio. Kun kelkaj aliaj novaĵoj, kiuj lastatempe venas el Pekino, tiu kongresa reprezentiĝo klare signis verŝajnan revigliĝon de la Esperanto-movado en la plej multkapa lando de la terglobo. Freŝaj informoj el Ĉinio parolas

世界语的理想和现实

叶君健



世界语创始人柴门霍夫

《圣经》(旧约)“创世记”第十一章说,最初人类的语言是统一的。他们在一起修一座城和塔,为的是要扬传自己的名。上帝

止。今年召开的第六十三届大会是七月三十日至八月五日在保加利亚黑海滨城市瓦尔纳举行的,参加者约五千人,代表五十多个国家,规模之大是空前的。中国世界语学会也派了一个代表团参加,笔者也是其中成员之一。这是十多年来我国第一次参加这个国际会议。

世界语是从拉丁语系和日尔曼语系提炼出来的一种简单易学、合乎逻辑的语言。柴门霍夫曾和他的同志们用世界语翻译了大量的世界文学名著,奠定了它的实用基础。现在

步世界语者也办了一个《中国无产者世界语通讯》月刊,报道中国共产党的抗日救国主张、中国苏区和工农红军的情况以及中国人民的生活和斗争。国外世界语者也把这些材料译成他们的本国文字,在本国报刊上发表。

后来以“中国普罗世界语者联盟”为核心又成立了公开的世界语协会,出版定期刊物《世界》,向世界人民介绍当时中国人民所进行的民族解放斗争。不久又相继出版了《中国怒吼》和《东方呼声》等期刊。它们在世界人民

是以三十年代中国进步世界语者所推行的拉丁化(即现在汉语拼音前身)运动和随后的大众语运动而展开的。

中国的世界语运动是紧密地与中国实际相结合的。它取得了一些有益经验,也作出了一些成绩。这次我们参加第六十三届国际世界语大会的代表团,人数虽然最少(四人),却受到很大的重视。国际世界语协会的领导人,在极端繁忙的大会工作中,特别挤出一下午的时间专门和我们座谈。他们所提出有关今后国际世界语运动的主张引起我们极大的兴趣,如:反对大国语言对小国语言的歧视;大力在第三世界推行世界语;大量出版世界语科技文化方面的书刊,使世界语能成

pri "raport-kunveno" en Pekino, kie la delegacio detale informis pri siaj kongresaj spertoj. La 4an de septembro, la Internacia Sekcio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco en aparta sesio diskutis raporton de la delegaciestro el la 63a UK. La 13an de septembro, en la ĉefa ĉina ĵurnalo "Renmin Ribao" aperis tre ampleksa artikolo pri Esperanto (v. la foton).

Apogo pro profunda konvinkiĝo

EKDE SIAJ UNUAJ PAŜOJ Esperanto estis intime ligita kun la nomo de la granda rusa verkisto Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910), kies 150-jaran naskiĝ-jubileon la homaro celebris en septembro 1978. La verkisto multfoje esprimiĝis pri diversaj flankoj de la internacilingva problemo kaj mem kontribuis al disvastigo de Esperanto. La de li gvidita eldonejo "Posrednik" aperigis kelkajn librojn en tiu lingvo kaj kunlaboris kun la revuo *La esperantisto*.

L. Tolstoj konsideris tre grava la ideon mem de la internacia lingvo. Pri tio ni povas ekscii el lia letero al V.V. Majnov de 1889 09 13. La verkisto dankas pro la alsendo de Esperanto-lernolibro kaj, i.a. rimarkigas: "Mi opinias tiun aferon — ellernon de unu lingvo fare de la eŭropanoj — kiel aferon de la unua graveco kaj tial mi dankas Vin pro la alsendo kaj, laŭ miaj fortoj, mi pensos disvastigi tiun lingvon; kaj, ĉefe, mi estas konvinkita pri ĝia neceso" (vol. 64, p. 304. **Noto:** ĉi tie kaj plue

cititoj estas referencataj laŭ la ruslingva Plena verkaro de de L.N. Tolstoj en 90 volumoj, Moskvo, 1928-1958).

Laŭ profunda konvinkiĝo de Tolstoj la diverslingveco mem malfaciligas interrilatojn de diversnaciaj homoj: "Pli ol unu fojon mi vidis, kiel la homoj trafis en malamikajn rilatojn unuj al la aliaj nur pro mekanikaj obstakloj al reciproka komprenado" (v. 67, p. 101). Tiu ĉi penso reeĥas kun pluraj analogaj eldiroj de Zamenhof.

En 1909, responde al la letero de la franca esperantisto J. Eidelman, Tolstoj skribas: "Mi plene konsentas kun la en via letero esprimita penso pri grandega signifo de la internacia lingvo kaj mi estus tre ĝoja, inter aliaj agantoj, ankaŭ mem laŭforte kontribui al tiu afero" (v. 80, p. 65).

En 1894 V.L. Kravcov, en la nomo de esperantistoj de Voroneĵ, petis al Tolstoj esprimi opinion pri la internacia lingvo ĝenerale kaj pri Esperanto speciale. En la res-

NEKROLOGOJ:

L. Tárkony 1902-1978

*Al flor-odor' miksiĝas
nuanco velka,
supre ĉiel' brilnajla:
kovrilo ĉerka.*

Per tiu ĉi strofo Lajos Tárkony fermis antaŭ 14 jaroj la poemon "Noktiĝo" kaj ankaŭ sian solan, sed jam tiam dolorige kompletan kaj nedaŭrigeblan poemaron *Soifo*. La 15an de julio 1978 li mortis, kaj la stelplenan ĉielon por ĉiam anstataŭos por li ĉerka kovrilo.

Li debutis sur la paĝoj de *Literatura mondo* kaj li restis ĝis la morto eble la plej fidela al la literaturaj strebadoj de tiu revuo. Ĝi estis por li samtempe hejmo, lernejo kaj metiejo. Eĉ dum la sesdekaj jaroj, kiam ankoraŭ aktive li partoprenis la redaktajn laborojn de *Hungara vivo*, ĉe iu ajn problemo li ekparolis kviete kaj melankolie: "En *LM* ni solvis similajn demandojn tiel, ke..."

Komence la publiko konsideris lin kritikisto, kaj ne malprave: per siaj recenzoj sur la paĝoj de *LM* kaj per sia esaro *De paĝo al paĝo* (1932, reeldonita de Hungara Esperanto-Asocio en 1976), li estas fakte la fondinto de la serioza literatura kritiko en Esperanto.

Poste li turnis sin al la tradukarto. Lin logis unuavice francaj kaj italaj poetoj; la kremon de la hungara poezio — kiel li mem diris en intervjuo, aperinta en la spe-

ciala Tárkony-numero (1975/6) de *Hungara vivo* — "fortradukis" de antaŭ li Kalocsay. Tamen, multaj hungaraj poemoj ŝuldas sian esperantlingvan vivon al lia plumo: plej laste — en la menciita Tárkony-numero de *Hungara vivo* — la majstra "Saluto al Thomas Mann" de A. József.

Tamen, Ludoviko Totsche, Lali Blond, Lajos Tárkony estis ĉefe kaj antaŭ ĉio poeto: unu el niaj plej bonaj originalaj poetoj. Tion konjektis jam la legantoj de *Literatura mondo*, *La nica literatura revuo* kaj *Hungara vivo*, sed plene tio evidentiĝis nur en la jaro 1964, kiam Stafeto eldonis lian *Soifon*.

Tárkony montriĝis en tiu ĉi volumo mildvoĉa lirikisto, kun versoj modestaj kaj sordinitaj, sed pri du aferoj neniam li konas kompromison: pri belo kaj artismo. Liaj versoj muzikas, enlulas, sorĉas. Tamen, ili ne estas kreitaj en beletra laboratorio: eĉ se ne krie kaj sinpropona, por sentemaj cerboj kaj koroj tamen klare perceptebla el ĉiuj liaj verkoj disradias io el lia supraĵe eble senkolora, sed vere riĉa, multifaceta personeco. Lia liriko estas vere persona liriko, kaj certe pro tio ĝi estas tiel korproksima al ĉiuj esperantistaj versamantoj.

Dum la lastaj jaroj diversaj malsanoj ĉiam pli superregis lin. Grave lin vundis antaŭ du jaroj la morto de la granda amiko Kalocsay, kiu ne nur estis la unua leganto de liaj verkoj, sed kies hejmo ĉiam estis malfermita por la solece vivinta Tárkony.

Lajos Tárkony mortis. Lia morto en si mem — bedaŭrinde — ne plu estas perdo por nia literaturo: ni, fune-

ponda letero de 1894 04 27 la verkisto indikas, ke li konsideras enkondukon de la internacia lingvo kiel "unu el la plej proksimaj antaŭstupoj", certigantaj "interkomprenon de homoj" sur la vojo al la tuthomara unuiĝo (v. 67, p. 101). Tolstoj plue analizas, kiel oni povus solvi la problemon de internacia komunikado. Li vidas kelkajn vojojn: 1) Lingvoj kuniĝos per si mem. Sed tio, "eĉ se okazos iam, do nur post tre longa tempo". 2) "Homoj sciu tiom multe da lingvoj, por ke ĉiuj havu eblon en tiu aŭ alia lingvo interkomunikiĝi". 3) "Ĉiuj elektu unu lingvon, kiun nepre lernu ĉiuj popoloj". 4) Fine, Tolstoj proponas la plej racian varianton: "Ĉiuj homoj de diversaj popoloj kreu por si unu plifaciligitan internacian lingvon kaj ĉiuj lernu ĝin." Kaj plue: "Ĝuste tio estas la ideo de la esperantistoj. Al mi ŝajnas, ke la lasta supozo estas la plej racia kaj, ĉefe, plej rapide efektivebla" (v. 67, p. 101).

Do ni vidas, ke Tolstoj subtenas internacian planlingvon, kiu tuŝu nenies naciajn sentojn kaj estu tre facila por studo.

Kiu planlingvo devas esti internacia? "Volapük ŝajnis al mi tre komplika; kontraŭe, Esperanto ŝajnis al mi tre facila". (v. 67, p. 101). Kaj la verkisto konkludas: "Mi... trovas, ke tiu lingvo [Esperanto] tute kontentigas la postulojn pri internacia lingvo" (v. 64, p. 304).

Tolstoj estis certa, ke Esperanto estas plej bona eblo solvi la problemon de internacia komunikado kaj tial li ĉiam per la esprimo "internacia lingvo" celis Esperanton.

Kun Esperanto Tolstoj konatiĝis, verŝajne, en 1888, ricevinte broŝuron senditan de L. Zamenhof (vidu E. Privat. *Vivo de Zamenhof*, Rickmansworth, 1957, p. 56). Dokumentoj montras, ke en septembro 1889 Tolstoj ricevis Esperanto-lernolibron flanke de V.V. Majnov — lia proksima konato, literaturisto, unu el la unuaj korespondantoj de Zamenhof (en la *Adresaro de esperantistoj* li havas la numeron 579). Majnov sciigis pri disvastiĝo de Esperanta literaturo kaj penis altiri la verkiston al la Esperanto-movado (V. 66, p. 223). Tolstoj konfirmas la ricevon: "Mi atente tralegis la de vi senditan lernolibron de la internacia lingvo" (v. 64, p. 304). Majnov ankaŭ estonte sendadis al la verkisto literaturon en Esperanto. Ekzemple, en decembro 1889 Tolstoj ricevis de li vortaron de Esperanto kaj liston de libroj en la internacia lingvo (v. 64, p. 343).

Ankaŭ Zamenhof tre interesiĝis pri subteno de Tolstoj. Li mencias tion en siaj leteroj al Majnov: "Mi dankas vin kore por la kopio de la letero de grafo Tolstoj, kiu faris al mi grandan plezuron. Mi esperas, ke la grafo donis sian promeson el la koro kaj ne el simpla ĝentileco,



Supre: Lajos Tárkony (1902-1978) ne povis elteni la solecon sen Kalocsay.

brantoj faligas larmojn por la homo kaj amiko, kiun ni amis, kaj sentas korporemon pro tio, ke lia valorega vivoverko fakte fermiĝis jam en 1964.

Spite onidirojn, li ne estis poeto nur por malmultaj: liaj poemoj — tre simplaj en sia rafiniteco — estas alireblaj por ĉiuj, kies koron ankoraŭ ne sursidis kalo en la moderna vivosvarmo. Plej inde ni omaĝu al lia memoro relegante kaj repensante la mesaĝon de lia milda koro.


Vilmos Benczik

Sube: Prof. d-ro Seiho Nishi (1885-1978), mondfama anatomo, dum jardekoj aktiva esperantisto.



S. Nishi 1885-1978

La 17an de aŭgusto forpasis en Tokio prof. d-ro Seiho Nishi (1885-1978), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La mondfama anatomo, kiu profesoris en pluraj japanaj universitatoj: Tohoko (1915-1922), Tokio (1922-1945), Gunma (rektoro, 1946-1961), lernis Esperanton ĉ. 1920 kaj restis aktiva dum pli ol duona jarcento. Jam en 1922 li fondis Esperanto-grupon ("Eskulapida Klubo") ĉe la Universitato de Tokio. Al prof. Nishi kaj tiu klubo ŝuldiĝas granda populareco — ankaŭ nuntempe — de la Internacia Lingvo en la medicinistaj rondoj de Japanio. Prof. Nishi estis vicprezidanto de TEKA (antaŭa nomo de UMEA), prezidanto de ISAE kaj direktoro de Japana Esperanto-Instituto. En 1965 li prezidis en la Loka Kongresa Komitato de la 50a Universala Kongreso, kiun oni ankaŭ nun konsideras la plej bone organizita UK. Pluraj fakaj studoj de prof. Nishi aperis en Esperanto en diversaj periodaĵoj (i.a. *Folia anatomica japonica*, *Medicina revuo*, *Internacia medicina revuo*). Libroforme aperis (1928) lia traduko de *Turo de Londono*, novelo de S. Nacume, *Miologio de la japano* (1953), anatomia studo *Nia korpo* (1961 kaj 1964), *Tagiĝo de la eŭropa medicino en Japanio* (1971), kiu estas traduko de Nishi sed ankaŭ parta reverko kaj prezento de tiu grava medicina teksto el Japanio. Nishi tradukis ankaŭ filozofiajn verkojn (germanajn, ĉinajn kaj hindajn).



L.N. Tolstoj: La genia verkisto ne estis simpla simpatianto sed profunde konvinkita amiko de la zamenhofa lingvo.

kaj lia helpo havos por ni gravan signifon" (*Ni laboru kaj esperu!* Eld. Ludovikito, 1974, p. 71). "Al la grafo Tolstoj vi povas sendi je mia kalkulo la mezan vortaron germanan kaj plenan rusan" (samloke, p. 81). "Leteron al la grafo Tolstoj mi ne skribis; mi sendis al li nur la adresaron kaj vortareton kun antaŭparolo" (samloke, p. 96).

La Unua Libro de Zamenhof elvokis tiel aprobajn, kiel skeptikajn reĥojn. Des pli estas interese noti, ke Tolstoj iĝis fervora adepto de Esperanto tuj kaj senŝanĝe. En sia taglibro li faris jenan noton, 1894 09 13: "Mi skribis al Straĥov kaj Majnov pri la lingvo Esperanto. Bona afero" (v. 50, p. 142).

Tiu lakona rimarkigo — "bona afero" — pravas, ke Tolstoj ne nur atente tralegis Esperantan literaturon, sed ankaŭ multe cerbumis pri ĝia enhavo. Kaj tial ne estas surprize, ke li esprimis sin per la frazo, kiu iĝis aforismo: "Ĉiuokaze, la ofero, kiun alportos ĉiu homo, dediĉinte iom da tempo por lerno de tiu lingvo, estas tiel malgranda, sed la sekvoj tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tian provon" (v. 67, p. 101).

Tolstoj ne nur sciis kaj aprezis Esperanton, sed li ankaŭ ĉiel penis disvastigi ĝin. Ekzemple, en la respondo al la letero de Majnov de 1889 10 10, kie tiu petis permeson traduki iun verkon de Tolstoj en Esperanton, la verkisto ne kontraŭis tradukon kaj nomis du verkojn: *En kio konsistas mia kredo* kaj *Pri la vivo* (v. 64, p. 317).

La letero de Tolstoj al esperantistoj de Voroneĵ estis publikigita en la ruslanda gazeto *Nedelja* kaj altiris al Esperanto atenton de la vasta publiko. Poste ĝi estis represita en la revuo *La esperantisto*, n-ro 7 de 1894 07 15 (v. 64, p. 317) kun antaŭparolo de Zamenhof: "La letero de Tolstoj estas tre grava, kaj ni petas niajn amikojn, ke ili penu presigi la tradukon de tiu ĉi letero en multaj gazetoj de iliaj landoj... kune kun klariga antaŭparolo pri la esenco de nia lingvo". Laŭ permeso de la verkisto la sama revuo (n-ro 2 de 1895 02 15) aperigis

lian leteron al A.G. Rozen sub la titolo "Prudento aŭ kredo".


Sed subite la afero ekhavis dramecan turniĝon: pro la publikigo de la artikolo de Tolstoj la cara cenzuro malpermesis importon de la revuo en Rusion, kie troviĝis plejparto de ĝiaj abonantoj. Tio estis fortega bato kontraŭ la ankoraŭ juna kaj malfortika Esperanto-movado. La solan Esperanto-revuon minacis pereco (*Antaŭen al la laboro!* Eld. Ludovikito, 1974, p. 216, 219).

Tiu cirkonstanco tre afliktis Tolstoj. Li opiniis sin respondeca pri la pereco de la revuo kaj, penante korekti la situacion, li sendis leteron al N.N. Straĥov: "Ekzistas doktoro kun familinomo Zamenhof, kiu inventis la Esperantan lingvon kaj eldonadis en ĝi revuon... La revuo havis 600 abonantojn, el kiuj plejparto estis en Rusio. Miaj amikoj, precipe unu, Tregubov, fervora adepto de Esperanto, dezirante subteni la revuon, donis tien unu mian leteron pri rilato de prudento al kredo, tre senkulpan, kaj ankoraŭ unu artikolon pri nepagado de impostoj en Holando. Tio igis, ke la Esperantan gazeton oni malpermesis enlasi en Rusion, kaj Zamenhof, pasie sindona al sia invento, ruiniĝinta ankaŭ antaŭe pro tiu afero, suferis parte ankaŭ pro mi. Ĉu oni ne povus elklopodi por li denove permeson pri enlaso de la gazeto en Rusion?" (v.68, p. 88).

Tolstoj sentis sin kulpa kaj, kvankam li estis fervora adepto de Esperanto, pretis eĉ rezigni de aktiva partopreno en la Esperanto-movado cele al ĝia savo: "Mi devontigas min nenion presi ĉe li [ĉe Zamenhof] kaj tute ne partopreni". Tiel li finas la leteron al Straĥov (v. 68, p. 88).

**NOVA
HONORA
MEMBRO:**

**Ŝihej
Mijake**



KEIL ANONCITE en nia septembra numero (p.160), la Komitato de UEA en Varno elektis s-ron Ŝihej Mijake (Japanio) Honora Membro de la Asocio. Mijake naskiĝis la 10an de oktobro 1901. Lerninte Esperanton en 1920, li komencis labori ĉe Japana Esperanto-Instituto en 1931 kaj restis tie ĝis sia retiriĝo en 1971. Li estis sekretario kaj direktoro de JEI, redaktoro de *Esperanto-lernanto* kaj *La revuo orienta*. Ĉefaj verkoj: *Elementa legolibro de Esperanto*, *Vortaro de Esperanto* (1965), *La rakonto pri Esperanto* (japanlingva); tradukoj: *La rakonto de Ŝuzenĝi*, *La leteroj el mia muzejo* (1949). **Sur la supra foto:** En aŭgusto ĉi-jare, la prezidanto de UEA vizitis s-ron Mijake (dekstre).

Busto de Tolstoj (verko de Ana Golubkina) en la leningrada Muzeo Ermitaj: Dum septembro ĉi-jare, la tuta mondo markis per solenaĵoj la 150an datrevenon de la naskiĝo de Tolstoj. La Esperanto-movado apenaŭ rimarkis la jubileon. Ĉu pro la fakto, ke neniu el la grandaj verkoj de tiu genia verkisto ĝis nun aperis en la lingvo, kiun li mem tiel forte apogis kaj admiris?!



Responde al la peto de Tolstoj, Straĥov skribis 1894 06 06: "Koncerne Esperanton, mi komisiis la aferon al Majkov. Li trovis ĝin ebla kaj **firme promesis fari**" (v. 68, p. 88).

La konata poeto Apollon Majkov estis tiutempe prezidanto de la komitato de eksterlanda cenzuro. La malpermeso estis forigita. Tamen pereon de la revuo eviti jam ne eblis. En aŭgusto 1895 ĝi ĉesis ekzisti. Anstataŭe venis nova revuo *Lingvo internacia*, eldonita en Uppsala (Svedio) sub la redakto kaj kun materia subteno de la odesa profesoro-kemiisto V.V. Gernet (*Tamen la afero progresas!* Eld. Ludovikito, 1975, p. 181).

Tolstoj aprezis kaj plurfoje emfazis la facilecon de Esperanto. Ekzemple, en letero al voroneĵaj esperantistoj li skribis: "La facileco de ĝia studado estas tia, ke, ricevinte antaŭ ses jaroj Esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn, verkitajn en tiu lingvo, mi post ne pli ol du horoj da studado estis en stato, se ne skribi, do almenaŭ libere legi en tiu lingvo" (v. 67, p. 101).

Estas grave, ke Tolstoj komprenis ligon de Esperanto kun la ideo de la tutmonda paco. Kiam en 1909 J. Eidelman petis permeson traduki en Esperanton iujn liajn artikolojn, Tolstoj respondis: "Por traduko en Esperanton de iu el miaj verkoj mi donas konsenton. Ĉu vi ne trovus konvena fari Esperantan tradukon de la ankoraŭ ne presita mia artikolo pri paco, preparita por la Stokholma tutmonda pac-kongreso?" (v. 80, p. 65). Baldaŭ fragmentoj el tiu artikolo estis publikigitaj (*Internacia scienca revuo*, Den Haag, 1910, n-ro 1, p. 49-52).

Tolstoj estus farinta multe pli por Esperanto, sed lia troa okupiteco malhelpis tion: "Da okupiĝoj ĉe mi aperas ĉiam pli kaj pli, sed da tempo kaj da fortoj ĉiam malpli kaj malpli. Pro la sama kaŭzo, malgraŭ tio, ke mi plene aprobas disvastigon de la internacia lingvo Esperanto, mi ne havas tempon okupiĝi pri ĝi" (v. 66, p. 223). Al la sama J. Eidelman, responde al lia peto skribi almenaŭ mallongan skizon pri Esperanto, Tolstoj respondas: "Mi estus ĝoja skribi pri signifo de la internacia

lingvo, sed estas dubinde, ĉu mi scipovos kaj havos tempon" (v. 80, p. 65).

Inter esperantistoj Tolstoj ĝuis altan aŭtoritaton kaj estimon. Malgraŭ persekutado de la verkisto flanke de la aŭtokrata reĝimo, multaj Esperanto-societoj petis la verkiston esti ilia honora membro. Kiam la rusa esperantistino A.N. Ŝarapova (kiu i.a. esperantistigis la verkiston Vasilij Eroŝenko) sciigis al Tolstoj pri lia elekto kiel honora membro de kelkaj Esperanto-organizoj, la verkisto respondis per la letero de 1909 07 10: "Bonvolu transdoni mian dankon pro mia elekto kiel membro en tiujn Esperanto-societojn, kiuj min elektis" (v. 80, p. 20).

Post jaro reprezentanto de esperantista studenta unio V.S. Bondarskij informis al Tolstoj pri lia elekto kiel honora membro de la unio. La verkisto respondis: "Mi plene simpatias al la agad-celo de via unio kaj dankas pro la elekto-honoro" (v. 81, p. 86).

Estas konate, ke Tolstoj posedis multajn lingvojn kaj emfazis ilian studadon, ĉar tio plivastigas la spirithorizonton kaj proksimigas la popolojn. Tial en letero al P.I. Birjukov la verkisto rekomendis: "Sed por instruado de lingvoj — ju pli multe, des pli bone. Mi opinias, jen kiujn lingvojn necesas instrui al viaj infanoj: la francan kaj germanan nepre, la anglan kaj Esperanton laŭeble" (v. 73, p. 68).

La fakto, ke Tolstoj konsideris Esperanton inter kelkaj elektitaj lingvoj, konfirmas, kian grandan signifon li donis al la Internacia Lingvo.

Eĉ tute etajn petojn koncerne Esperanton Tolstoj ne lasis sen atento. Ekzemple, estis senditaj libroj pri Esperanto al farbisto V.V. Kalinin el la vilaĝo Ozerci de Moskva gubernio (v. 82, p. 234).

Dum la vivo de Tolstoj kaj post lia morto pluraj liaj verkoj estis publikigitaj en Esperanta traduko. Sed liaj plej gravaj libroj dume ne atingis la Esperanto-mondon. Tamen Lev Tolstoj, la plej granda verkisto iam ajn arde apoginta Esperanto, certe tion meritas.

Boris Kolker

Pesimismo povas esti pozitiva

ANTAŬ kelkaj semajnoj islanda ĵurnalo aperigis intervjuon kun franca poligloto, kiu asertis, ke li scias ĉiujn lingvojn de Eŭropo, escepte de la finna kaj hungara. En la fino de la intervjuo la ĵurnalisto demandis, kion tiel eksterordinara multlingvulo opinias pri la internacia lingvo Esperanto. Respondis tiu, iom kurte kaj forpuŝe: "Mi ne interesiĝas pri Esperanto. Ia ajn literaturo en ĝi ne ekzistas."

Unuareage, kiam mi legis ĉi tiujn vortojn de la franca poligloto, mi ja ŝokiĝis. Jen, mi pensis, ja krianta ekzemplo de tiu misfama, blinda aroganteco, bazita sur nescio kaj antaŭjuĝemo. Iom poste mi tamen pli trankvile ekserĉis klarigojn pri tiu sinteno, metis al mi demandojn. Ekzemple: Ĉu estus eble, ke la francaj esperantistoj eventuale neglektis inde informadi al la franca publiko pri la ekzisto de la Esperanta literaturo? Kaj, ĉu eventuale la sama manko konstateblus pri la propaganda enhavo de nia informado ĝenerale? Kaj, ĉu mi erarus suspektante en la lasta tempo kelkan nefidon kaj dubon en niaj propraj vicoj pri la valoro de niaj literaturaj atingoj por atentigi pri la valoro de Esperanto kiel lingvo taŭgserva en la rigore praktika kaj profitcela moderna mondo?

Ni ja konas la asertojn, kaj ja pravajn, ke ni bezonas ne nur poetojn. Sed de tia aserto, depende de la cirkonstancoj, estas nur nuanca paŝo al plena malfido: Ni ne bezonas niajn poetojn. Mi eĉ suspektas, ke tiu ja kres-

kanta dubemo aŭ hezitemo pri la valoro de la originala literaturo en Esperanto komencis efiki hezitige eĉ ĉe tiuj inter ni, kiuj emas okupi sin pri serioza verkado en Esperanto. Ekzemple, laŭ mia sperto, la Belartaj Konkursoj de UEA dum la lastaj jaroj pli-malpli respegulis kelkan mankon de tia sindediĉo, kia estas necesa por krei kontentige altnivelajn verkojn. Eĉ ĉi-jare, kiam la rikolto estas neordinare bona, unu el la juĝintoj plendas pro neglektemo, pro certa manko de pacienco, ĉe iuj verkistoj, kio malhelpas ilin atingi atingeblan, pli altan nivelon en la verkoj. La klarigoj pri tiuj malvirtoj certe, depende de la kazoj, estas pluraj, sed tre eble unu grava estas ĝuste tiu neklara endubiĝo pri la seriozo de nia tuta literatura entrepreno, kiun mi menciis. Nefidemo, kiu ne nur troviĝas ekster niaj vicoj, kiel en la kazo de la franca poligloto, sed kiu ankaŭ eble komencis filtriĝi en niajn proprajn vicojn, en la korojn mem de niaj verkemuloj.

Kaj mi parolas ne nur pri la Belartaj Konkursoj. Antaŭ ĉirkaŭ du jardekoj la originala literaturo de nia lingvo ankoraŭ maturiĝe floris, ni tiam daŭre vidis pli-malpli regulan aperon de longspiraj, altnivelaj verkoj de aŭtoroj, kiuj havis kaj la kapablon kaj la kuraĝon dediĉi sin paciencie al originala, serioza verkado en Esperanto. Ni ĉiuj konas la nomojn kaj mi ne mencias ilin. Mi nur volas atentigi pri tio, ke la sola originala grandverko aperinta lastatempe, *La granda kaldrono* de John Francis, fakte devenas el tiu tempo, sed restis neeldonita dum unu kaj duona jardekoj.

Ne ŝanĝas la bildon radikale tiu fakto, ke ni vidis en la nuna periodo kelkajn elstarajn verkojn en Esperanta traduko. Tradukoj, malgraŭ siaj nekontesteblaj meritoj, esence ne kreas literaturon propran de iu ajn lingvo. Troa emfazo sur tradukado tendencas pasivigi la pensadon, depreni el la iniciatemo, kiu estas necesa por serĉi kaj esplori proprajn ideojn kreociele. Famaj esceptoj apenaŭ refutas tiun teorion, nek la fakto, ke multaj naciaj literaturoj kaj ja ankaŭ la Esperanta ekestis pere de tradukoj. Se literatura agado en iu lingvo fluadas ĉefe depende de aliulaj pensoj, laŭ antaŭe deciditaj direktoj, la literaturo propra de tiu lingvo malfacile progresas, kaj tio ankaŭ validas pri la Esperanta literaturo.

Tiu ĉi enkonduko, mi konfesas, estas eble tro kritikeme prezentita, kaj ja tre eble povas esti, ke mi misvide uzis tro da grizo en mia pentrado de la situacio. Sed jam trifoje mi estas en la pozicio, kiel la jara raportanto pri la Belartaj Konkursoj de UEA, elekti la kolorojn, kaj ĉiam preferis pentri la bildon eble iom tro hele, en la bona kredo, ke optimismo estas pli konstruiva ol pesimismo. Ni komprenu, tamen, ke finfine tiuj ĉi terminoj estas tro ĝeneralaj kaj nebulecaj por esti uzeblaj

BELARTAJ KONKURSOJ 1978 Originala poezio; Unua premio:

POEMOJ SEN TITOLO

Ne ĉasu vortojn — nek poemojn.
Sed serĉu lokon. Jen: nub-randoj

metale prilumitaj; ali-
flanke de l'vojo ileks-folioj

brilas. La mondo pikas min
paperen, kiel papilion.

— — —

Ne petu. Nur atendu. Pretaj
poemoj frontos. Kaj atendu:

ĉar eblas fuŝi la detalojn
aŭ ne tutigi. Kreskos alte

kastelo el karto: malkonstruu,
rubigu. Gravas, kio restas.

Kris Long

BELARTAJ KONKURSOJ 1978

Originala poezio; Dua premio:

LA MERLO

Dum la krepusko
pintpenike
repentras
la teron
per malhelaj farboj,
la praa merlokanto
min renaskas Eva;
la brilaj, trilaj tonoj
jubile brilante
envolas mian nudon

ree en Paradizo.

Rejna de Jong

kiel fidindaj decidiloj. Optimismo povas esti absolute senfekunda, kiam bazita sur nefirmaj premisoj, kaj la tiel nomata pesimismo ja povas esti pozitive produktiva en la psiko, kiam lokita tiel fronte al la faktoj, ke ili incitas al reorganizo de sintenoj kaj metodoj en la klopodado krei novajn realaĵojn. Mi ja daŭre kaj neŝancebleble opinias, ke ĝuste la Belartaj Konkursoj povas konsiderinde kontribui al tiu klopodado, sed nur kondiĉe ke ni faru al ni vere seriozajn postulojn. Mia alvoko, do, al niaj verkemuloj, sonas simpla: Respektu, respektu viajn kreaĵn kapablojn tiel, ke vi dediĉu al viaj verkaĵoj sufiĉe da serioza serĉado kaj esplorado, sufiĉe da tema kaj forma studado, sufiĉe da energia ripensado, kaj se vi havas la plej etajn suspektojn pri via lingva kompetento, submetu viajn verkaĵojn al la prijuĝo kaj kritikado de sperta sciulo pri la lingvo antaŭ ol malprivatigi ilin, ekzemple per prezento al konkurso. Mi estas konvinkita pri tio, ke tiaj agmanieroj jam farus, se ne miraklojn, do almenaŭ en multaj kazoj agrablajn transformojn de eĉ modesta krudmaterialo.

En tiu ĉi jaro la Belartaj Konkursoj de UEA eniris novan trijaran juĝperiodon. Kelkaj ŝanĝoj okazis ankaŭ en la vicoj de la juĝantaro; eliris el la juĝkomisiono tri membroj, nome Edwin de Kock, Ebbe Vilborg kaj Richard Wood. Al tiuj mi esprimas multajn dankojn pro ilia helpo dum la lasta oficperiodo. Alvenis kvar novaj juĝantoj. Ni do havas nun entute en la juĝkomisiono 12 membrojn, po 3 por ĉiu branĉo. Ili estas: Por poezio: Probal Daŝgupto, Masao Miyamoto kaj Neil Salvesen; por prozo: Vilmos Benczik, Johan Hammond Rosbach kaj Ivo Rotkvić; por dramo: Marjorie Boulton, Carlo Minnaja kaj Pierre Ullman; kaj por eseoj: Árni Bödvarsson, Detlev Blanke kaj Reto Rossetti. La branĉo fotografio pro la cirkonstancoj devas esti juĝata surloke, en la Universala Kongreso mem. Ĉi-jare mi ĝuis la helpon de Hallgrímur Sæmundsson, Islando, por tiu tasko. La konstanta sekretario de la Konkursoj estas Alec Venture; li prizorgas la rutinan kaj tamen varian korespondlaboron dum la konkursjaro, akceptas la

konkursaĵojn, dissendas ilin al la juĝantoj kaj kolektas la rezultojn. Al li kaj al ĉiuj juĝantoj mi esprimas miajn varmajn dankojn pro ilia modela laboro por la ĉi-jaraj konkursoj.

Kompare kun la lastaj tri jaroj la ĉi-jara partopreno en la Belartaj Konkursoj estas neordinare multera. Envenis entute 101 literaturaj konkursaĵoj (lastjare 56) kaj 78 fotoj, do entute 179 konkursaĵoj. Ĉiuj konkursaĵoj estas originalaĵoj, kiel ja diktas la nova regularo. Laŭ la konkursaj branĉoj la divido estas jena: **Prozo** 24 (lastjare 16), **Poezio** 63 (lastjare 32), **Teatraĵo** 12 (lastjare 6), **Eseo** 2 (lastjare 2), **Fotografio** 78 (lastjare 14).

Aparte rimarkinda estas la subita plialtiĝo, ja duobliĝo, de la nombro de poemoj. Preskaŭ sendube tio estas klarigebla per la lastjara ĉesigo de la poezi-konkurso Larius, kiu, sub la energia gvido de Aldo de' Giorgi, jam kvinfoje sukcesis altiri tre multajn partoprenantojn, kaj variige kontribuis al la Esperanta literatura sceno. Mi volas ĉi-rilate citi vortojn de Aldo de' Giorgi mem, kiujn mi ja volonte aprobas kiel prizorganto ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA: Li skribis lastjare en cirkulero pri la ĉesigo de la Konkurso Larius: "Venis la tempo kiam fariĝas konsilinde rezigni pri ĉiu ne nepre necesa dissplitiĝo de la iniciatoj kaj rekonduki kaj koncentri ĉiujn fortojn nur en la plej gravajn aranĝojn, t.e. sub la komuna, neanstataŭebla tegmento de nia tutmonda organizaĵo: Universala Esperanto-Asocio." Mi persone kaj en la nomo de UEA dankas al Aldo de' Giorgi pro lia tiel esprimita granda lojaleco al UEA, kaj pro lia samtempa instigo al niaj verkemuloj dediĉi sin al la plifortigo de la Belartaj Konkursoj, pere de siaj kontribuoj.

Antaŭ ol anonci la ĉi-jarajn premiojn mi volas iom komenti ĝenerale pri ĉiu unuopa literatura branĉo. Unue, la prozo:

En miaj enkondukaj vortoj mi jam kritikis negativajn aspektojn, plejparte surbaze de komentoj de juĝintoj, konstateblajn ĉe tro multaj el la konkursaĵoj. Tio ja validas antaŭ ĉio pri la prozo, precipe tiu manko de pacienca, labora zorgemo. Alia karakteriza malvirto de iuj el la prozaĵoj estas la troa didaktikeco, en kiu la verko servas nur por illustri iun filozofan, socian aŭ alian tezon de la aŭtoro. Alia ekstremo estas tiam, kiam verkinto notas veran okazintaĵon, supozante, ke la aŭtentikeco mem garantias art-efekton. Unu juĝinto ŝuldigas tion al malkono de la bazaj kriterioj de litera-

PLIA PREMIO POR MAURO NERVI

En la anonco pri la ĉi-jaraj premioj en la Belartaj Konkursoj de UEA elfalis la nomo de unu plia premiito en la teatra branĉo, tiu de **Mauro Nervi (Italio)**, kiu gajnis la duan premion, egale kun Vesna Skaljer-Race, pro sia dramo *Parabole*. Mauro Nervi gajnis ankaŭ la unuan premion en la teatra branĉo, kiel jam anoncite. La sekretario kaj la prezidanto de la Belartaj Konkursoj pardonpetas al s-ro Nervi kaj la publiko pro la eraro.

turaj verkoj, de la plej elementaj reguloj de la literatura metio. Ĉi-rilate estas aparte kritikindaj tro oftaj kazoj de malalta stila nivelo, kio estas tiom pli pripensiga, ke nia originala literaturo havas ja belajn tradiciojn koncerne la stilon.

Prijuĝi poemojn en konkurso estas ja komplika afero. Ĉiu poemo rajtas esti konsiderata kiel aparta verkaĵo, kaj samtempe oni devas decidi pri ĝia relativa vicloko en la konkursaĵa tuto. Oni devas klopodi aŭskulti ĉiun poemon aparte, kvazaŭ ian orfan fenomenon, izolan, eksterkadratan. Kompreneble tio estas reale neebla, ĉar ĉiu poemo neeviteble dependas de ekzemple epoko kaj modo, kiuj influas kaj ĝin kaj la juĝanton. En konkurso poemo estas kuntekste orfa en tiu senco, ke la ceteraj konkursaj poemoj ne subtenas ĝian celon simpatie, kiel ja ofte okazas en samaŭtoraj poemaroj. La juĝanto tial estas devigita vicordigi la poemojn laŭ eleksteraj kriterioj, kiuj preskaŭ perforte emas loki ĉiun konkursaĵon interne de sistemo de valoroj kiuj ne devenas el tuja kunteksto de reciproke simpatiaj informoj pri aŭtoraj celoj, kiel en harmonia poemaro, sed laŭ pli-malpli abstraktaj ideoj pri tio, kio estas poezio. Tial, mi estas tiom pli danko al tiuj juĝantoj, kiuj per detalaj komentoj klarigis siajn sintenojn kaj kriteriojn; mi volas ĉi-rilate aparte mencii la elstarajn komentojn de la novaj pripoeziaj juĝantoj, Daŝgupto kaj Salvesen, ili altmerite aldoniĝas al la akumuliganta bazo de prikonkursaj komentario kiu jam komencis formi atentindan kriterion eventuale uzebligotan en la estonta prijuĝado.

La 63 konkursintaj poemoj montras certe variecon kaj diversnivelecon. Ĝeneralan informon pri tio donas la grupigmetodo de unu el la juĝintoj. Li gradigis la poemojn esence en kvin valorgrupojn, numerante ilin per la unuaj literoj de la greka alfabeto: alfa, beta, gama. La plej malaltnivelaj poemoj lokiĝas en la grupo gama, entute 12. En la grupo beta-gama, do iom pli bonaj, lokiĝis 10 poemoj, en la grupon beta 18, en la grupojn alfa-beta kaj alfa kune 12 poemoj. Alia juĝinto aparte rimarkigas pri la ofta diferenca nivelo ĉe unuopaj poemoj — kiel tutaĵoj ili fiaskis, sed bonaj partoj: versoparoj, unuopaj frazoj kaj figuroj estas konstateblaj. Mi volas ĉi-rilate mencii, ke se iuj el la konkursintoj deziras persone vidi analizajn prijuĝojn de siaj konkursaĵoj, mi estas preta sendi ilin, se mi konsideros tion aparte edifa; ŝajnas al mi, ke ĝuste tia informa reenmeto estas unu el la taskoj de la BK, tasko cetere neglektita ĝis nun. Mi do petas tiujn konkursintojn, kiuj interesiĝus pri tiaj informoj, skribi al mi, kaj mi provos servi al ili laŭ ebleco kaj cirkonstancoj. Mi esperas, ke tiaj kontaktoj inter la konkursintoj kaj la juĝkomisiono estas jam urĝe necesaj, kaj povus eventuale helpi al pli kultura integriĝo de la Belartaj Konkursoj ol estis konstateble ĝis nun.

La teatraĵa branĉo estas probable la plej kontentiga en la ĉi-jaraj konkursoj. Pri tio mi estas aparte feliĉa. Verkado en Esperanto por la teatro certe ne estis io pri-fierinda. Tamen jam montriĝis lastatempe kreskanta kaj bonaŭgura interesiĝo pri tiu temo inter la esperantistaro. Mi ĉi-rilate volas aparte mencii diskutojn pri la

temo ĉe la Internacia Junulara Festivalo en Jezolo, Italujo, en marto ĉi-jare, surbaze de atentinda enkonduka eseo de Aldo de' Giorgi sub la titolo "Junularo kaj teatro". Tie li konstatas, ke preskaŭ tute mankas vere ludindaj teatraĵaj tekstoj en Esperanto; ke la ekzistantaj tradukoj ne ĉiam estas senriproĉaj el lingva vidpunkto, kaj la plej multaj jam arĥaikiĝis; kaj ke originalaj tekstoj estas tre malmultaj kaj konsistas preskaŭ ekskluzive el mallongaj, naive popularecaj satiraĵoj. Tial estas aparte bonveniginde, ke la kontribuadoj por la teatra branĉo ĉi-jare certe montras nivelan plialtiĝon kompare kun la pasintaj jaroj. Espereble ili ĉiuj ne restos nuraj manuskriptoj, sed trovos la vojon al viva surscenejigo. Plej dezirinde estus, ke en la ĉiujara UK iu aktora grupo prenu sur sin prezenti la plej taŭgan teatraĵon de la antaŭjara konkurso, kaj tiel multobligi la motivojn de la eventualaj konkursontoj, samtempe grave kontribuante al tiu literatura fako de nia kulturo. Mi ĉi-kune anoncas mian pretecon pri en tiu afero, se ekestos interesiĝo pri tio.

Laste, la branĉo eseo, lanĉita antaŭlastjare laŭ iniciato de la familio Minnaja. Temas unuavice pri eseoj formalaj, temantaj pri aferoj lingvaj, literaturaj aŭ sociologiaj, prefere en ligo kun Esperanto kaj ĝia uzado, sed ankaŭ, kiel mi esprimis tion lastjare, estas trovebla tie loko por eseoj neformalaj, kie riveligigas elementoj personaj, se tiuj elementoj iel kunligiĝas al la ĉefa direkto decidita de la kondiĉo, ke la temo iel koncernas Esperanton kaj ĝian kulturon. Lastjare la koncerna premio, Premio Luigi Minnaja, ne estis aljuĝita, ĉi-jare ni decidis ĝin aljuĝi malgraŭ unu nekonsenta opinio; mi ĉi-tion mencias pro la aparta severeco de ĉi tiu branĉo, kiu postulas pli eldiran raporton.

Al la premiitoj mi esprimas miajn gratulojn. Al ĉiuj konkursintoj en la Belartaj Konkursoj por 1978 mi varme dankas pro ilia partopreno, samtempe esprimante mian esperon, ke venontjare same daŭros kaj eĉ plikreskos la atento de niaj verkemuloj pri la Konkursoj, kiuj estas ja komuna kulturaranĝo de ni ĉiuj.

Baldur Ragnarsson

BELARTAJ KONKURSOJ 1979:

Porinfana literaturo

OMAĜE al la Internacia Jaro de la Infano — 1979 — estas decidite, kun aprobo de la Estraro de UEA, ke dum la konkursperiodo 1979 funkcii en la kadro de la Belartaj Konkursoj **aparta branĉo de porinfana literaturo**: fabeloj, rakontoj, noveletoj, poemoj, kantoj, drametoj. Estas la espero de la Komisiono de la Belartaj Konkursoj, ke la konkursaĵoj en tiu ĉi poreventa branĉo estos atentinda kontribuo al la porinfana literaturo en Esperanto. Ankaŭ por ĉi tiu konkursa branĉo validas la teknikaj informoj, kiujn vi trovas aliloke en ĉi tiu revunumero (p.182).

Defio kaj tradukvenko

Recenzas Petar Stefanović (Jugoslavio):

La trofeoj; La sonetaro de José Maria de Heredia (1842-1905). El la franca trad. G. Waringhien. Kopenhago: TK/Stafeto, 1977. 220p. 21cm. Belliteratura eldonserio 36. ISBN 87 87089 08 4.

La Parnaso daŭras: antaŭ ni kuŝas la sola poemaro de la poeto, kiu plej bone enkorpiĝas la estetikan idealon de tiu franca poezia skolo. Kvankam la versaĵoj de Heredia aperadis jam en la jaroj ĉ. 1860, ili estis kolektitaj nur en 1893. En la 120 sonetoj de *La trofeoj* la disĉi-



plo de Leconte de Lisle, ekskludante ĉiun personan intervenon kaj baziĝante sur skrupula erudicio, elvokas la historion kaj la legendon, prezentas la homojn kaj la naturon, sed, fidela al la ideo de la arto por la arto, evitas la aktualajn temojn. "Grekujo kaj Sicilio", "Romano kaj la barbaroj", "Mezepoko kaj Renesanco", "Naturo kaj revo" — tiaj estas la titoloj de la sonetcikloj.

Per siaj koncizaj kaj striktaj formoj, per la skulptura plastikeco kaj pitoresko de la vortfiguroj, la sonetoj prezentas finfaron de la parnasaj arto kaj tekniko. Eĉ plie, la plej belaj el ili ne estas senigitaj je interna drameco.

La universitata kritiko jam delonge esploris la procedojn de *La trofeoj* kaj malkovris iliajn fontojn. En tiu rilato, la tezoj de la beograda profesoro M. Ibrovac (1885-1973) por la franca ŝtata doktoreco (1923) restas ankoraŭ necesaj al ĉiu profunda studo de la parnasa skolo. Tamen, pri la arto de Heredia ne ĉiuj opinioj estas en akordo. Unuflanke, la vasta publiko estas tre sentema al la versaĵoj lernitaj en la infana aĝo kaj juneco. "La konkerantoj de l' oro" ja okupis en somero 1955 la deksekan lokon inter la ducent plej belaj poemoj de la franca lingvo (13a-19a jc.), elektitaj de kvar mil ducent aŭskultantoj de la Franca Radio-Televizio, surbaze de listo de kvincent poeziaĵoj, kaj, dek jarojn pli poste, aperis en Parizo poŝformata eldono de *La trofeoj*. (Pri la konstanteco de la parnasa arto alilande atestas la publikigo en Moskvo, antaŭ kvin jaroj, de rusa traduko de la integra sonetaro en la akademia serio "Literaturaj monumentoj".) Aliflanke, granda parto de la poetoj kaj erudiciuloj konsideras Heredia-n eksmodiĝinta aŭ duaranga verkisto: por unuj, *La trofeoj* estas "sonetaro plena de ferrubo kaj malnovaj mebloj, cetere taŭgaj por la revado" (V.-L. Saulnier, 1945); por aliaj,

"Heredia estas bona laboristo el la antaŭurbo Saint-Antoine: li fabrikas la solidan kaj konsciencan antikvaĵon" (G. Pompidou, 1961); por triaj, kvankam J.-M. de Heredia "pacience cizelis la luksegajn sonetojn de *La trofeoj*, la publikigo de la sonetaro en 1893 montriĝis kiel anakronismo, sed ago de kortuŝa fideleco" (P. Brunel, 1972).

Kial do Waringhien, konsciante mem, ke "Heredia estis solida talento, ne genio", tamen elektis por tradukado poeton minoran? Unue, ĉar la artisto sciis eltiri el la mallongeco de la soneto admirindajn efektojn de plivastigo, cizeli "la sturmon de l' Titanoj sur pomo de ponardo". Due, pro la sukcese aranĝitaj sonoraj, relie-faj kaj kolorriĉaj bildoj. Unuvorte, ĉar "de bona manlaboristo oni ĉiam povas lerni". La tradukinto devis utili-gi ĉiujn esprimrimedojn de la Internacia Lingvo, simpla kaj ekonomia, malriĉa je sinonimoj kaj disponanta pri malabunda fonto de rimoj, por transversi la Heredian kanton en Esperantajn mezurojn: la poeto ja estis amatoro de la vortoj raraj, pitoreskaj kaj sonoraj. Waringhien akceptis la defion kaj majstre superis la obstaklojn. La leganto juĝu mem laŭ tiaj specimenoj de la tradukarto, kiaj estas "La forgeso", "Fuĝo de centaŭroj", "Tomba epigrafo", "La peto de la mortinto", "Antonio kaj Kleopatra", "La konkerantoj de l' oro", "La korala rifo", "Tiu pentristo", "Sobiranta suno", "Maris Stella", "Antikva medalo". *La trofeoj* estas signo de venko por Waringhien kaj grava akiraĵo por la Esperanta tradukpoezio.

Mendu ĉe UEA: 12,00 (por Nederlando 12,48) gld., plus sendokostoj 10%.

Sen redakta tuŝo

Recenzas Rob Vetter (Nederlando):

Elektrolitoj de B.M. Cavanagh. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1974. 73p. 29cm.

La aŭtoro de *Elektrolitoj* estas antaŭa universitata lekcisto pri fiziko-kemio, nuntempa lekcisto pri Esperanto. Li ludis rolon en la estiĝo de la teorio de elektrolitoj, kiel "verda junulo" en 1922. Do, jam duona jarcento da esperantismo permesas fluan lingvaĵon. Ĝi efektive estas flua, foje eĉ poeteca. Tamen, pedantulo malkovras lingvajn erarojn aŭ dubindaĵojn: kulombo de elektro (da), ekvilibrio (ekvilibro), la valoroj konsentas (akordas), realigi formulon (kompreni), geniala ideo (genia), volumo (volumeno), kun definitaj parametroj (determinitaj), redukcio (redukto). Nur malofte frazo estas malfacile komprenebla: Ambaŭ celantas la valoron, unu, kiel C nuliĝas (p.37).

Troviĝas kelkaj faklingvaj esprimoj diskuteblaj aŭ dubindaj: sodio (natrio), galvanana ĉelo (pilo), elektra ŝarĝo

(ŝargo), specifa konduktanco (konduktiveco), moviĝa kinet-energio (pleonasmo), integriginte (integrinte), meza (meznombra). Cavanagh elektis la maltaŭgan "pro" en: la laboro pro gramatikulo. Estas nekonsekvenca la anstataŭigo de la internacia mallongigo exp (eksponenciala) per eksp en scienca teksto, kiu ja ne povas malhavi la literon x. Cavanagh cetere mem skribas "X-radioj". Stranga estas la difino de specifa konduktanco: kurento pasanta tra unitkubo pro elektromova forto.

La temo prezentiĝas en klara aranĝo de ĉapitroj kaj paragrafoj, speciale la kvin stadioj en la derivado de la ekvacio Milner-Debye. Rimarkinda estas la foresto de iu ajn ilustraĵo, ĉu grafika diagramo, ĉu bildo de aparato. Kiu nivelo estas supozata de la leganto? Nu, li havu jam universitatajn konojn: la nocioj gramekvivalento, aktiv-koeficiento, la "konata" rilato de Gibbs kaj Duhem, la teoremo de Poisson. Tio ŝajnas iom malekvilibra en rilato kun la detalema klarigo pri la Boltzmann-faktoro. Estas ĝeno, ke sur p. 24-25 unu sola frazo ampleksas 2/3 de unu paĝo ligante ses numeritajn formulojn. La evidente grava simbolo M, honore al Milner, enkondukiĝas sen difino, same kiel la nocio ekvivalentkoncentriteco de la jono i (N_i). Sub la ekvacio 65 aperas substrekite "ne necesas uzi tiun ekvacion". Kaŭzas multan pripensadon antaŭ ol la trompita leganto malkovras, ke li uzu ĝuste tiun ekvacion 65 por kompreni la sekvan tekston.

Oni devas bedaŭri, ke Cavanagh elektis por la verko temon, kiu jam ne plu estas tiel ekscita kiel antaŭ duona jarcento. Nun oni levas la brovojn legante la subtitolon "Moderna teorio". Ankaŭ aliaj aspektoj estas malmodernaj: la uzo de la vorto pezo por la nocio maso, de elektrostataj unuoj, anstataŭ la unuoj de la Sistemo Internacia; de grammolekulo anstataŭ molo; de la nesimetriaĵoj de la elektrofiziko enhavantaj la konstantojn C kaj π en neoportunaj lokoj, kaj finfine, la malobservo de dimensio favore al nombra valoro.

Someraj Universitataj Kursoj havas nesupertakseblan gravecon por la Movado. *Elektrolitoj* estas interesa temo, elegante limigita, fakule prezentita, en scienca lingvaĵo, malgraŭ kelkaj supraj rimarkoj, kiuj estas eviteblaj se oni eldonas la kursojn post redakta prizorgo. La libro estas rekomendebla al studentoj de kemio, fiziko kaj metalurgio (korodo, galvanizado) kaj al la favorantoj de sciencaj verkoj en Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 18,90 (por Nederlando 19,66) gld., plus sendokostoj 10%.

Bona itala lernilo

Recenzas D.B. Gregor (Britio):

Esperanto, rivoluzione della parola de V. Dall'Acqua. Milano: Istituto Editoriale Universitario, 1977. 167p. 20cm.

Ĉi tiu bone produktita lernolibro estas rimarkinda pro tri kialoj: 1) ĉar eldonis ĝin universitata instituto;

2) pro la nekutima prezentado de la lingvaj elementoj; 3) pro tio, ke la fina parto (p.105-161) konsistas el reprodukto de la *Ekzercaro* kun laŭokazaj notoj.

Dekkvar-paĝa enkonduko klarigas, kial Esperanto estas la ununura solvo de la aktuala lingva problemo. Sekvas 82 paĝoj da lecionoj, enhavantaj de tempo al tempo elĉerpaĵojn el la *Piccolo Dizionario Turistico* de FIAT. La materialo de ĉiu leciono, prezentata sur la maldekstra paĝo, kaj sekvata de tri aŭ kvar paĝoj da klarigoj, ŝajnas unuavide esti korektita presprovaĵo. Poste oni rimarkas, ke la kolumno de pli dikaj presliteroj formas rimantan versaĵon. Bone; sed rezultas, ke la elementoj prezentitaj devenas ne de iu teorio pri la ĝusta sinsekvo de gramatikaĵoj, sed de la hazardo de poezia verkado. Tial en la leciono 2 troviĝas: infinitivo, difina artikolo, finaĵoj -a, -o, -e, **jen**, prep. **por**, **kun**, **el**, neg. **ne**, afiksoj **mal-**, **-ec**, **-aĵ**, **-in**; kaj jam en la leciono 6 prezentiĝas la kunmetitaj verbttempoj aktivaj kaj pasivaj, kun senkomenta traduko de **estis -ita** samtempe per pasivaj preterito kaj pluskvamperfekto. (Por la diferenco inter verboj de daŭro kaj rezulto — ĉi tie "fino" —, tamen ni devas atendi la lastan lecionon).

La klarigoj estas tre okulfrappe faritaj kaj, kompreneble, tuŝas aparte tiujn punktojn kie Esperanto diferencas de la itala. Mi trovis nur du aferojn por mi bedaŭrindajn: **legantas** kaj **legitis** prezentitajn kvazaŭ laŭokazaj alternativoj; kaj **po-kun-akuzativo** aprobitan. Kompreneble, la kondamno de **-itulo** plaĉis. Resume, tre bona lernolibro.

Mendu ĉe UEA: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld., plus sendokostoj 10%.

HUMPHREY
TONKIN:

Spenser's Courteous Pastoral

BOOK SIX OF THE
Faerie Queene

Oxford: Oxford University Press, 1972. 11+329p. Bind. 22cm. ISBN 0 19 812020 6. Prezo: 15,00 (por Nederlando 15,60) gld., plus 3,00 gld. por la sendokostoj (aŭ nur 1,50 gld., se vi mendas ĉi tiun libron kune kun viaj aliaj bezonaĵoj ĉe la Libroservo de UEA).

Ni havas apartan kialon subite reklami ĉi tiun anglalingvan libron: La aŭtoro — prezidanto de UEA — donacis al la Libroservo de UEA kelkdekon da ekzempleroj, kies vendo subtenos la ĝeneralan kason de la Asocio. La studo traktas la ĉefverkon de Edmund Spenser (?1552-1599), angla renesanca poeto, kies talenton oni konsideras en la angla literaturo malsupera nur al tiu de Ŝekspiro.

BRITA SEKCIO DE TEJO:

Feniksa fenomeno

Junularo Esperantista Brita, fondita en 1959 ĉefe per la entuziasmo de la nuna prezidanto de UEA, proksimiĝas al sia 20a datreveno. Tio estas okazo retrorigardi, taksu la atingojn, reaprezi la agadon de antaŭaj aktivuloj.

Mi ĵus legis artikolon de David Kelso kaj Ian Carter en la nova, festa numero de *Kial ne?*, konata gazeto de JEB. Sub la titolo "Obstina vivovolo" ĝi kronikas, kun nomoj, datoj kaj statistiko, la ondecan progreson de JEB dum ĝiaj 20 jaroj. Multaj nomoj tie menciitaj havus nenian signifon por junaj esperantistoj ekster Britujo. Sed fakte, ili stimulas malmultan reagon ankaŭ de la hodiaŭaj britaj junuloj. Jen afero, neniel surpriza, kiu tamen atentindas por ĉiuj junularaj organizoj. Mi nomas ĝin la "generacia faktoro"; en la praktiko ĝi ofte montras sin kiel "feniksa fenomeno".

Alivorte, junulara organizo konsistas el junuloj kaj ĝin gvidas junuloj. Tio eble aspektas ridinde evidenta aserto; sed, ĉu oni sufiĉe atentis pri ĝiaj naturaj sekvoj? Certe JEB — kaj mi uzas ĝin ĉi tie nur kiel ekzemplon — ie kaj iam malatentis. En la pasintaj dudek jaroj oni vidas malkapablon konservi impulson. Sur certaj kampoj ĝi puŝiĝis antaŭen sed tuj reglitis saman distancon. En aliaj aferoj ĝi eĉ marŝis surloke. Membraro estas proksimume sama kiel en 1959, ekstera agado malpli intensa, organizaj problemoj, kiujn frontis sensperte antaŭa generacio, nun kaŭzas kapdoloron al nova generacio same sensperta.

Junuloj, domaĝe, oldiĝas, eĉ sufiĉe rapide. Homoj pli aĝaj ol 25 ne rajtas esti membroj de JEB. Ĉiuj junularaj organizoj devas, laŭdifine, havi similan aĝlimon. Do la fluo de homoj tra junulara organizo estas granda: la membraro povas ŝanĝiĝi 100-procente en dek jaroj.

El la vidpunkto de la membraro necesas do konstanta agresa varbkampanjo ĉe lernejoj ktp. por anstataŭigi la forirantajn 25-jarulojn. Sed necesas konstante anstataŭigi ankaŭ la gvidantojn, kiuj ordinare estas la plej spertaj. Sed anstataŭigo de gvidantoj ne estas nura afero de varbado: necesas trejni novulojn, transdoni grade respondecojn, entute plani. En JEB, tio ŝajne okazis neofte.

Tial ni identigas memstarajn generaciojn inter la gvidintoj de JEB: Tiu de Humphrey Tonkin komencis, la t.n. Ruĝa Gvardio de Brian Moon kaj aliaj estris postan periodon, en 1969 la administracio devis translokiĝi al Edinburgo, kaj dum pluraj jaroj Ian Carter grand- kaj ofte sol-rolis por teni JEB viva. Ĉiu el tiuj estis, iasence, "fenikso", grupo de aktivuloj naskiĝanta el la cindroj de la antaŭa. JEB vivadis fenikse.

Ĉu tio estas la plej efika maniero funkcii? JEB elfaris multon, sed ĉu ĝi ne estus atinginta pli, se ĉiam estus konsekvenca transdono de respondecoj de unu al alia, kaj daŭre plivastigata spertostoko, el kiu ĉiu nova generacio povus ĉerpi? Tiajn demandojn nun faras la komitatanoj de JEB, konsciante, ke jam pli juna generacio atendas en la kulisoj. Pli granda emfazo al gvida kontinueco povus inaŭguri novan, pli progresan periodon por JEB, kredeble ankaŭ por la esperantista junularo alilande.

Ian Jackson

Laborkapacita zorgo

KIEL GRANDIGI la laborkapaciton de la organizo? Tiun demandon oni studas en TEJO. Unu solvon oni adoptis en 1977 starigante kvar konstantajn komisionojn de la TEJO-komitato. En la ĉi-jara IJK, la Komitato reapogis tiun principon, nomante al tiuj komisionoj novajn agantojn, fondante novan komisionon kaj postulante, ke ĉiuj komisionoj ĉiujare skribu raportu al la Komitato, kaj malpli formale al la estrarkunsidoj. Dumjara laborigo de komitatanoj estas nur duono de la celo de la komisionoj. Ili respondecas al la Komitato — sed ili estas malfermaj al ne-komitatanoj. Jen do invito al junuloj kaj fakuloj partopreni la laborojn. La Komisiono pri varbado (gvidanto: A. Wandel, Hakalir-str. 15, IL-64245 Tel Aviv, Israelo) bezonas ĵurnalistojn, reklamistojn, tradukistojn kaj artistojn. Sed -antoj estas ankaŭ bonvenaj, kompreneble.

Junuloj kiuj loĝis en aŭ spertas pri ekstereŭropaj landoj pleje valoras por la Komisiono pri regiona agado (gvidanto: F. Gabalda, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Ned.), kiu per korespondado kaj trovo aŭ kreo de konvenaj informiloj kaj lerniloj provas arigi izolitajn junajn esperantistojn en lokajn grupojn, kaj tiujn transformi en landajn sekciojn.

Eksteraj rilatoj havas delonge sian KER (gvidanto: C. Lendvay, p.f. 193, H-1368 Budapest, Hungario). KER denove havas deĵoranton; tio ne signifas, ke la graveco de lokaj agantoj malpliĝas. Male, referaĵoj pri lingvo-problemoj, helpo organizi seminariojn, taŭgaj surlokaj reprezentantoj de TEJO en ne-esperantistaj konferencoj estas daŭre bezonataj.

Teoriajn kaj strategiajn demandojn diskutas kaj diskutigas la Komisiono pri Celoj. Ĝi volonte ricevas ideojn kaj proponojn (gvidanto: S. Tsitirides, Atlantos 26, Kato Patisia, Athinai, Greklando).

La nove fondita Komisiono pri la kongresa temo volonte ricevos de vi komunikon (gvidanto: B. Casini, C.P. 210, I-56100 Pisa, Italio).

Resume, oni konsideru sin invitita al kunlaboro!

smg



Kongresa Komuniko

64-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Lucerno (Svislando) 1979 07 28 – 08 04

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: Esperanto, Poŝtfako 14,
CH-6512 Giubiasco, Svislando.

Protektos la Federacia Prezidanto. Alta Protektanto de la 64a UK estos d-ro Hans Hürlimann, nun federacia vicprezidanto de Svislando. Laŭ la svisa sistemo, d-ro Hürlimann fariĝos en 1979 federacia prezidanto.

Kompakta kongresejo. Preskaŭ ĉiuj aranĝoj de la Kongreso (probablaj esceptoj estas la ĉefa teatra prezento kaj la Svisa Vespero) okazos en la Kongresdomo de Lucerno, ĝuste en la centro de la urbo. Ĉar Lucerno mem estas kompakta urbo, kongresanoj ne timu pri longa marŝado.

ISU en Lucerno. Kadre de la 64a UK okazos la 32a sesio de Internacia Somera Universitato. La ISU-Komisiono invitas universitatajn profesorojn kaj aliajn kvalifikitajn personojn sendi prelegproponon al ĝia sekretario, prof. S. Kawamura, 424-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 761 Japanujo. Oni sendu la proponon (kun resume de la prelego, mallongaj biografia noto kaj bibliografio) en tri ekzempleroj kaj aldonu unu fotoportreton de la proponanto. Ĉio ĉi atingu la sekretarion antaŭ la 15a de januaro 1979.

Belartaj Konkursoj alvokas. Ĝus aperis 25 jaroj, antologio de la unua kvaronjarcento (1951-1975) de la Belartaj Konkursoj. Tiuj, kiuj volas eniri la antologion de la dua kvaronjarcento de BK jam ekverku!

La Belartaj Konkursoj akceptas originalajn verkojn en la branĉoj poezio (tri premioj), prozo (tri premioj; maksimume 200x65 literspacoj), eseo (unu premio "Luigi Minnaja"; proks. 400x65 literspacoj), dramo (tri premioj; maksimuma ludodaŭro 25 minutoj) kaj fotografio (tri premioj; minimuma formato 13x18cm.). Unua premio estas 220 gld.; dua premio 154 gld.; tria premio 80 gld.; premio "Nova Talento" 154 gld.; kaj premio "Luigi Minnaja" la jara rento de 4000 gld.

Sekretario de la Belartaj Konkursoj estas s-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey SM6 0EG, Britio. Verkoj en ĉiuj branĉoj krom fotografio devas atingi lin ĝis la 31a de marto 1979. Konkursaĵojn por la fotografia branĉo oni sendu al Foto-Konkurso, p.a. Loka Kongresa Komitato, por alveni ĝis la 1a de julio 1979.

Detala regularo de la Konkursoj estas senpage ricevebla de la sekretario aŭ de la CO de UEA.

Aperis afiŝo, Unua Bulteno, aliĝilo. Fervojo Pilatus afable eldonis du mil kolorajn afiŝojn kun bildo de monto Pilatus kaj teksto pri la UK. La grandformata (100x64cm.) afiŝo estas eble la plej bela, kiu ĝis nun eldoniĝis okaze de UK.

La Unuan Bultenon, en formo de okpaĝa kolora turisma prospekto pri Lucerno kun kvarpaĝa suplemento pri la UK, eldonis la Lucerna Turisma Oficejo en 20 000 ekzempleroj. La membraro de UEA ricevis ĝin kune kun Jarlibro 1978.

Pro teĥnikaj kaŭzoj la aliĝilo aperis nur fine de aŭgusto. Ĝi eliris kune kun la septembra numero de revuo *Esperanto*.

Lokaj societoj petu la afiŝon kaj kvantojn de la Unua Bulteno kaj la aliĝilo ĉe sia landa kongresa peranto aŭ ĉe la konstanta adreso de la UK. La Unua Bulteno kaj aliĝilo estas ankaŭ al unuopuloj laŭpete disponeblaj.

Varbu reklamojn por la UK! La Dua Bulteno kaj la Kongresa Libro estas inter la plej gravaj porokazaj eldonaĵoj en Esperanto ĉiujare. En ĉiu la reklamtarifo estas por la 64a UK 400 svisaj frankoj por plena paĝo (800 svfr. por interna kovrilo); 230 svfr. por duonpaĝo; kaj 140 svfr. por kvaronpaĝo. Esperantistoj, kiuj peras reklamojn de neesperantistaj entreprenoj, ricevas malklaraĵon 10%. Reklamspaco estas bona investo por esperantistaj entreprenoj, kiuj ĝuas rabaton 50%. Interesitoj skribu al la konstanta adreso por mendilo.

Kunlaboros "Europa-Cantat". Samtempe kun la 64a UK, Lucerno gastigos ankaŭ la organizon "Europa-Cantat" (Eŭropa Kantistaro), kiu unuigas kantistojn el la tuta kontinento kaj kantas en dek ses lingvoj (Esperanto eble fariĝos la dek-sepa!). Estas antaŭvidite, ke Europa-Cantat prezentos la tutan Svisan Vesperon subvencie de "Pro Helvetia" kaj la urbo Lucerno.

IJK en Nederlando. La 35a Internacia Junulara Kongreso okazos en Austerlitz, intima vilaĝeto de la komunumo Zeist, Nederlando, de la 20a ĝis la 27a de julio 1979. Austerlitz situas en unu el la plej belaj ŝtataj arbaroj de la lando. Ĝis la fino de 1978 la validaj IJK-kotizoj estas, en nederlandaj guldenoj:

1. Ĝis inkluzive 20-jara	170
2. De 21-jara ĝis inkluzive 25-jara	190
3. De 26-jara ĝis inkluzive 32-jara	210
4. 33-jara aŭ pli	235

Individuaj membroj de TEJO (t.e. individuaj membroj de UEA malpli ol 26-jaraj) subtrahu de tiuj kotizoj rabaton, 10 gld. La kotizo inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj ekskurson. La kotizon oni prefere ĝiru al nederlanda poŝta ĝirkonto n-ro 4007032 de 35a IJK, Postbus 4083, 9701 EB Groningen, Nederlando, al kiu adreso

oni samtempe sendu la aliĝilon. Nur se ne eblas pagi al la indikita poŝta ĝirkonto, oni konsultu la landan sekcion de TEJO aŭ la landan peranton de UEA pri pagmaniero. Disponeblas nur 350 lokoj. Temo de la 35a IJK estos "Interŝtataj unuiĝoj – kiucele?". La 35a IJK fermiĝos frue vendrede, la 27an de julio, por doni tempon atingi la 64an UK en Lucerno.

Aventuraj ekskursoj kaj postkongreso. Kongresanoj havos okazon konatiĝi kun la monto Pilatus, kiu aperas sur la kongresa afiŝo, per unu el la du duontagaj ekskursoj; la alia estos la tradicia kongresurba rondveturado.

Planitaj estas kvar tuttagaj ekskursoj, kies celojn oni atingos per trajno (ordinara aŭ dentrela), ŝipo, telfero kaj funikularo (montara kablotramo): Rigi, Titlis, Lugano kaj Bern.

Organizata estas nun Oficiala Postkongreso en Interlaken, la mondfama feriejo inter la ĉarmaj lagoj Thun kaj Brienz. La Postkongreso estos esence unu longa ekskurso, kiu inkluzivos veturon per la plej kruta funikularo de Svislando! La tuto daŭros de dimanĉo, la 5a, ĝis sabato, la 11a de aŭgusto 1979.

Loĝado kaj ĉies buĝeto. La loĝtarifoj sur la kongresa mendilo kredeble varias inter 92 kaj 96 svisaj frankoj. Oni tamen ne plendu pri malgranda prezvario, ĉar temas pri 92 svfr. por unu nokto en unulita ĉambro kun banejo en luksa hotelo, kaj 96 svfr. por la tuta kongresa semajno (sep tranoktoj) en amasloĝejo! Entute estos kvin hotelkategorioj, ĉiuj kun unu- kaj du-personaj ĉambroj, kun aŭ sen banejo; studenta loĝejo, po 250 svfr. por la tuta semajno kun tri manĝoj tage; kaj la menciita amasloĝejo.

Aktuale pri kongresaj perantoj. Oni bonvolu noti jenajn ŝanĝojn en la listo de Oficialaj Perantoj de la UK en la Unua Bulteno: Argentino havas novan peranton, s-ron Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, Rosario (Santa Fé). La nova aŭstra peranto estas s-ro Ernst Majtanić, Kalksburgerstr. 40, A-1238 Wien 23 (pĉk. 1838745 Wien). Nia finna peranto, s-ro Harri Laine, ŝanĝis la adreson al Karhuniityntie 17, SF-02810 Espoo 81; lia pĉk.-numero restas 39135-3. Kaj Japana Esperanto-Instituto translokiĝis al Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio.

Pensu pri beleco

uzante sur viaj korespondadoj la allogan trikoloran glumarkon! Cent markoj kostas 8,25 (por Nederl. 9,60) gld., kio inkluzivas la sendokostojn.

Mendu ĉe via libroservo aŭ ĉe la Libroservo de UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederl.



Tuj aĉetu numeron nul de

SEMAJNO



internacia magazino sendependa

unika aktuala semajna revuo en la internacia lingvo, kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj. Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu medio.

Konvinkiĝu mem!

Vi ricevas numeron nul (provnumeron) de SEMAJNO kontraŭ pago de 3,—gmk al poŝtkonto Nbg 65092-858 (S. Maul, Semajno, Augsburg) aŭ sendo de 4 internaciaj respondkuponoj (aŭ pago alimaniere) al

S. Maul, SEMAJNO, Singerstrasse 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Grupoj ĝuas rabaton de 10%

ĉe mendo de pli ol 5 ekzempleroj. Subskripcia kampanjo nur ĝis meze de decembro 1978!

Klare skribu vian adreson!

Bazoj de anarkiismo, La, G. Balkanski. El la bulgara (?). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1979 (fakte 1978). 148p. Mimeo. 21cm. LJP 128A. Prezo: 5,70 gld.

Eroŝenko: Ĉelovek, uvidevŝij mir, A.S. Ĥarkovskij. Moskva: Nauka, 1978. 294p. Ilus. 20cm. "Homo, kiu ekvidis la mondon": pri Vasilij Eroŝenko (1890-1952), blinda rusa Esperanta verkisto, kiu multe vojaĝis en Azio kaj Eŭropo. Ruslingva. Prezo: 7,50 gld.

De animo al animo: Filozofio de la vivo por tiuj, kiuj penas kaj suferas, Huberto Rohden. El la portugala trad. D. Pereira de Souza. Rio de Janeiro: Spiritista Eldona Societo "F.V. Lorenz", 1977. 206p. 21cm. Spiritisma aforismaro. Prezo: 5,70 gld.

Einführung in die Esperantologie (1973), Pierre Janton. El la franca trad. G. Becker kaj M. Becker-Meisberger. Hildesheim/New York: Georg Olms Verlag, 1978. 104p. 21cm. ISBN 3 487 06541 X. Germanlingva traduko de *L'Espéranto*. Historio de Esperanto kaj analizo de ties strukturo. Prezo: 24,30 gld.

El unu verda vivo, William Auld (1924-). Kuopio: Lingvoponto, 1978. 44p. 21cm. Poemoj porokazaj, inkluzive de versformaj leteroj kaj omaĝo al K. Kalocsay. Prezo: 5,70 gld.

Esperanto; Lingvolerno laŭ naturmetodo, Pietro Dao. Trento, la aŭtoro, 1974. 31p. 24cm. Dek legaĵoj, ĉiu kun demandaro kaj vortlisto. Prezo: 2,70 gld.

Esperanto; Lingvo, movado, instruado. Red. Detlev Blanke. Berlin: Zentraler Arbeitskreis Esperanto, 1977. 4+187p. Mimeo. 21cm. Artikolaro esperantologia, kun studoj de K. Kalocsay, M.I. Isaev, E.A. Bokarev, W. Gilbert, A. Pettyn, D. Blanke, D.B. Gregor k.a. Prezo: 9,00 gld.

Esperantologiaj kajeroj 2. Red. Zs. Varga-Haszonits. Budapest: Universitato Eötvös Loránd, 1977. 273p. 24cm. Artikoloj pri gramatiko, literaturo, instruado kaj interlingvistiko. Kun historio de la Esperanto-Fako de la Universitato Eötvös Loránd kaj bibliografio de la verkoj de d-ro István Szerdahelyi. Prezo: 17,70 gld.

Esperanto-makedona vortaro kaj makedona-Esperanta vortaro, kun konciza gramatiko, Metodi Galeski kaj Gjorgji Pop-Atanasov. Prilep: Esperanto-Societo "La Progreso", 1977. 284p. 17cm. Bind. Prezo: 14,10 gld.

Gastoj de Glito kaj Glato (1966), R. Nakagaŭa kaj J. Jamaŭaki. El la japana trad. T. Huĝimoto. Tokio: Hukuinkan-Ŝoten, 1976. 27p. Kolorilus. 27cm. Bind. Esperantaj tekstoj surgluitaj. Prezo: 10,50 gld.

Geriadur brezhonek-esperantek, Erwan ar Menga. Rennes: Hor Yezh, 1978. 50p. 21cm. Serio "Deskomp Esperanteg" 3. Vortaro bretona-Esperanta. Prezo: 4,80 gld.

Geriadur esperantek-brezhonek, Erwan ar Menga. Rennes: Hor Yezh, 1978. 58p. 21cm. Serio "Deskomp Esperanteg" 2. Vortaro Esperanta-bretona. Prezo: 4,80 gld.

Glito kaj Glato (1963), R. Nakagaŭa kaj J. Oomura. El la japana trad. T. Huĝimoto. Tokio: Hukuinkan-Ŝoten, 1976. 27p. Kolorilus. 27cm. Bind. Rakonto pri du musoj, kiuj preparas sian manĝon. Esperantaj tekstoj surgluitaj. Prezo: 10,50 gld.

Historio de Esperanto-movado en Oosaka, La, Sigeo Matumoto. Kasiwara Esperanta Dokumento-Centro, 1976-7. 2 vol. Entute 219p. 25cm. Japanlingva, pri la periodo 1916-1951. Prezo (ambaŭ volumoj kune): 16,20 gld.

Instigoj al nova monda ekonomi-ordo kaj efika helpo al evoluigo, Jozef Hartl. Viin (Vieno): La aŭtoro, 1978. 28p. 20cm. Internacia diskutejo 4. Prezo: 8,10 gld.

Kain kaj Abel, Sándor Szathmári (1897-1974). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 288p. 19cm. ISBN 963 571 006 2. Dudek tri noveloj konsistigas esence la trian kaj kompletigan volumon (kun *Vojaĝo al Kazohinio* kaj *Maŝinmondo*) de la esperantlingva verkaro de genia satiristo. Redakto kaj postparolo de V. Benczik. Bibliografio. Prezo: 18,30 gld.

Kanto pri fajr-ruĝa floro, La (1905), Johannes Linnankoski (1869-1913). El la finna trad. E. Kuoppala kaj J. Jäntti. Kuopio: Finna Esperanto-Librojo, 1978. 134p. 25cm. Romano pri "la universala donjuan-problemo". Prezo: 17,10 gld.

Konstitucio por Tera Federigo. El la angla trad. K. Price kaj R. Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1977. 2+58p. 21cm. Malneto proponita de la Asembleo por Mondkonstitucio (Innsbruck, junio 1977). Prezo: 6,00 gld.

Koro de l'Budhismo, La; Sistema kurso en Budhismo, Ven. C. Njanasata Mahathero. St. Blasien: Budhana Ligo Esperantista, 1978 (2a eld., tralaborita). 52p. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Kristana Esperantista Jarlibro 1978. Roma: IKUE/KELI, 1978. 128p. 16cm.

Lazur' kristala kaj pluv' susura; Utaaro, Masayuki Kuroda (1909 -). Oosaka (ne indikita), 1978. 117p. 19cm. Originalaj kaj kelkaj el-japanigitaj utaoj kaj longutaoj, inkluzive de kelkaj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Prezo: 10,50 gld.

Lirika prozo, A. Lopez Luna. Buenos Aires: Amikoj de Lopez Luna, 1978. 50p. Mimeo. 17cm. Aforismoj. Prezo: 3,60 gld.

Más amplios horizontes en el escultismo internacional, J.K. Hammer (1928-). Trad. el Esperanto S. Aragay. Skolta Esperanto-Ligo, 1978 (neindikita). 32p. Ilus. 14cm. Konsilaro pri internaciaj skoltaj agadoj, kun informoj pri Esperanto. Prezo: 1,50 gld.

Metodiĉeskie razrabotki po mejdunarodnomu jazyku Esperanto dlja kursov, B.G. Kolker (1939 -). Ufa: Ufimskij Klub Esperanto, 1978. 80p. Mimeo. 20cm. Prezo: 5,10 gld.

Morto de la ĉielarko, La; Elektitaj poemoj kaj artikoloj, Endre Ady (1877-1919). Red. Vilmos Benczik. El la hungara. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 87p. 20cm. Bind. ISBN 963 571 028 1. Tradukoj de Emba, Kalocsay, Szilágyi k.a. Prezo: 12,00 gld.

Poemoj (1918), Gerard Manley Hopkins (1844-1889). El la angla tradukis Kris Long. Bracknell, 1978. 22p. 21cm. Dek naŭ verkoj de la jezuita pastro-poeto. Prezo: 2,70 gld.

Pramejo, Gin Hin. Adaptis Jang Ĝaŭlin. El la ĉina. Pekino: Fremd-lingva Eldonejo, 1977. 70p. Kolorilus. 26cm. 88-Es-142P. Bild-rakonto pri knabino kiu helpas malkovri kaj kapti spionon. Prezo: 1,80 gld.

Revolucio de 1911, La, Kompila Grupo por la Broŝuroj pri la "Moderna Ĉina Historio". El la ĉina. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1978. 9+151p. Ilus. 19cm. 11-Es-1373P. Prezo: 1,80 gld.

Sesdekoka — ĉu decida jaro?, La. Redaktis G. Silber. Pisa: La Nuova Fronteira, 1978. 27p. Ilus. 30cm. Artikolaro pri eventoj en 1968, pri la studentaj movadoj tiujaraj; intervjuoj kun H. Marcuse, A. Springer kaj R. Dutschke. Prezo: 6,00 gld.

Seitsemänkymmentä vuotta esperanton vaiheita Turussa 1906-1976, Niilo Kavenius. 54p. Ilus. 21cm. Finnlingva historio de la Esperanto-movado en Turku. Prezo: 5,00 gld.

Tondajoj / Knipsels / Wycinanki, Wouter F. Pilger (1942-). Vulpo-Libro, 1978. 26p. Ilus. 21p. ISBN 90 70074 09 5. Tri-lingva (Esperanta, nederlanda kaj pola) poemaro. Prezo: 4,20 gld.

DIVERSAĴOJ:

Afiŝo. Sveda Esperanto-Federacio, 1977. Vorto "Esperanto" super karikaturado de kvin evidente diversnaciaj homoj. Nigro kaj verdo sur orflava fono, kun spaco por anonco pri kurso aŭ simile. Prezo por 10 ekz.: 4,20 gld. (formato A4); 7,20 gld. (formato A3).

Beiaard van Antwerpen*, Jo Haazen. Bruselo: Decca, 1977. 30cm. 33 t/m. 35 min. Duflanka. Dek kariljonaj melodioj, luditaj en la Katedralo de Antverpeno, verkoj de i.a. Mozart kaj Scott Joplin. Kovrilo donas komenton en la nederlanda, Esperanta, franca, germana kaj angla lingvoj. Prezo: 25,50 gld.

Poŝtkarto "Roazon-Renno". Blazono el floroj de la ĉefurbo de Bretonio. Prezo de 10 ekzempleroj (minimuma mendo): 5,10 gld.

Ŝildeto luksa por aŭto. Metala, kun verda stelo en blanka cirklo sur verda aŭ flava fono kaj la vorto "Esperanto" supre. Argent-aspekta laŭgirlingando ĉirkaŭe. Diametro 8cm. Gluebla. Prezo: 10,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas **la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimуме 3,— gld.**

Malto

- Meze de aŭgusto en Malto oni organizis la unuan Esperanto-kampadejon por deko da infanoj,



kiuj dum unu semajno intense lernis la lingvon. Meze de majo okazis multe pli grava aranĝo, sed ni ne sukcesis pli frue raporti pri ĝi. Temis pri "Esperanto-Semajno" de Malta Esperanto-Societo. La Semajno havis tre riĉan programon: gazetara konferenco, Esperanta meso, ekspozicio en la Nacia Biblioteko, prelegoj, literatura vespero, speciala poŝta stampo (vidu la bildon), du intervjuoj en la Malta Radio, ktp. Entute, temis pri tre sukcesa aranĝo de la novaliĝinta landa asocio de UEA.

Kubo

- Esperantistoj el Svedio, FR Germanio, Hungario kaj Hispanio ĉeestis la 11an Mondan Festivalon de la Junularo kaj Studentoj, fine de julio kaj komence de aŭgusto en la ĉefurbo de Kubo. Ili konfirmis informojn, ke en unu el la mezlernejoj en havano okazas libervola, tamen oficiala, instruado de Esperanto. Dudeko da havanaj esperantistoj havis apartan renkontiĝon kun la esperantistoj, kiuj partoprenis la Festivalon.

Sud-Afriko

- En du sudafrikaj universitatoj funkcias studentaj Esperanto-kluboj. Tiu en la Universitato de Potchefstroom ekzistas jam du jarojn kaj nun havas 36 membrojn. La dua klubo fondiĝis antaŭ nelonge ĉe Randse Afrikaanse Universiteit en Johanesburgo.

Aŭstrio

- De aŭstroj oni eventuale ne klopodu lerni kiel harmoniigi la enlandan Movadon, ĉar tie dum pluraj jaroj ekzistas du organizaĵoj pretendantaj tutlandecon. Tamen, ili ambaŭ viglas, eble pro konkurenco, kaj tio alportas bonajn rezultojn. Ekzistas tial aferoj, kiujn ni ja povus

lerni de aŭstroj. Aŭstria Esperantista Federacio (aliĝinta landa asocio de UEA) kaj ties Societo por Internaciaj Kontaktoj jam dum pluraj jaroj aranĝas altnivelajn programojn kunlabore kun informaj centroj, ambasadoj kaj konsulejoj de aliaj landoj. Por novembro oni anoncas du tiajn programojn: la 3an pri Soveta Unio, kaj la 24an pri Aŭstralio, — ambaŭ kun E-filmoj, artistoj, eminentaj gastoj, ktp. De la alia landa organizaĵo — Aŭstria Esperanto-Movado — eblas lerni ion pri bona informa laboro kaj sekcesigo de korespondaj Esperanto-kursoj.

Japanio

- Movadaj renkontiĝoj, "kunloĝadoj", seminarioj kaj kongresoj estas tre oftaj en Japanio. Ili malfacile altiras internacian partoprenantaron pro simplaj geografiaj kialoj. Tamen, la 5a Internacia Esperanto-Renkontiĝo, meze de septembro en Tokio,

inter kvindeko da partoprenantoj povis firi nombri reprezentantojn de ses aliaj landoj (Singapuro, Britio, FR Germanio, Usono, Koreo kaj Hungario).

Francio

- En Nancy (orienta Francio), la 9an kaj la 10an de decembro ĉi-jare okazos kvar intensaj Esperanto-kursoj, por infanoj, komencantoj, progresintoj kaj bonaj regantoj de la lingvo. Por pliaj informoj skribu al: Esperanto — MJC, 27 rue de la République, F-54000 Nancy, Francio.

Venezuelo

- Venezuelana Esperanto-Asocio ricevis inviton ekde oktobro ĉi-jare starigi oficialan kurson de Esperanto en la Universitato Simón Bolívar en Caracas. Kiel jam anoncite (v. nian numeron de julio-aŭgusto, p. 129), la Centra Universitato de Venezuelo starigis oficialan studprogramon por Esperanto. Tiu kurso sukcese komenciĝis la 8an de septembro. En ambaŭ universitatoj instruas prof. Jorge Mosonyi, prezidanto de la Asocio.

Fake

- **Instruistoj:** Inter la 19a kaj 27a de aŭgusto, en la itala urbo Gorizia okazis la 12a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Partoprenis ĉ. 60 geinstruistoj el 12 landoj, inter kiuj reprezentigis ankaŭ tiel foraj mondpartoj kiel Aŭstralio kaj Madagaskaro. En la solena inaŭguro de la Konferenco (vidu la foton) ĉeestis ĉ. 150 personoj, inter kiuj tro-



viĝis la urbestro de Gorizia kaj pluraj aliaj altranguloj de la itala publika vivo. La Konferenco traktis tutan aron da aktualaj demandoj, inter kiuj ankaŭ la venontjaran ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, kiun ILEI organizas en la sidejo de Unesko en Parizo. Aparte menciinda estas vere granda reeĥo de la Konferenco en la itala gazetararo, kiu dediĉis dudekon da tekstoj al la evento.

Socilingvistiko

• Dum la 9a Monda Kongreso de Sociologio en Uppsala (Svedio), inter la 14a kaj 19a de aŭgusto, en la socilingvistika programo du esperantistoj prelegis pri lingvoproblemoj: Stojan Ĝuĝev (La konfliktoj kaj lingva diskriminacio en la internaciaj rilatoj) kaj Geoffrey Sutton (Malegaleco kaj kultura polarigo en la oficiala sveda fremdlingva instru-politiko). Jonathan Pool, kiu apartenis al la ĉeforganizantoj de la Kongreso, mem ne prelegis. Estis anoncitaj ankaŭ la prelegoj de R. Corsetti, I. Lapenna kaj M. Isaev, sed ili ne okazis.

Traduka literaturo

• La Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN kaj Belga Esperanto-Federacio organizas konkurson pri tradukoj el la nederlanda lingvo en Esperanton. Temas pri tradukoj de literaturaj, prozaj kaj versaj. La konkurso atingi antaŭ la 15a de februaro 1979 la sekretarion de la konkurso (f-ino A.J. Middelkoop, Jonkerweg 11, 1217 PL Hilversum, Nederlando), ĉe kiu oni petu ankaŭ pliajn informojn pri la konkurso.

Distingoj

• La 26a Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, fine de julio en Milwaukee, Wisc., elektis s-ron Armin F. Doneis honora membro de ELNA. S-ro Doneis estis dum multaj jaroj la ĉefdelegito de UEA en Usono. Ankaŭ la 49a Itala Kongreso de Esperanto, komence de septembro en Cesena, elektis tri honorajn membrojn de Itala Esperanto-Federacio: inĝ. Giordano Azzi, prof. Elio Migliorini kaj senatano Alberto del Nero, prezidanto de la itala parlamenta grupo "Amikoj de Esperanto".

Filatelio

• Esperanto-Ligo Filatelista (ELF) kaj Amika Rondo de Esperantaj Kolektantoj (AREK) aperigis jam la 3an ĝisdatigitan katalogon pri Esperantaj filatelaĵoj (poŝtmarkoj, stampoj, glumarkoj ktp.). La katalogo estas riĉe ilustrita kaj enhavas ankaŭ utilajn atentigojn pri kelkaj filatele senvaloraj aĵoj, kiuj cirkulas inter la kolektantoj ("serioj" de Fujeira, Roza Insulo, Cavalcaselle ktp.). La katalogon petu (8,- germanaj markoj, plus sendokostoj) ĉe: W. Heimlich, Fröbelstr. 4, D-304 Soltau.

Kotiztabelo por 1979

Landa valuto	AM	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino	300	6000	15000	9000	4500	30000
Aŭstralio	0,42	8,40	21,00	12,60	6,30	42,00
Aŭstrio	8	160	400	240	120	800
Belgio	16	320	800	480	240	1600
Brazilo	8	160	400	240	120	800
Britio	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Bulgario	0,52	10,40	26,00	15,60	7,80	52,00
Ĉeĥoslovakio	6,5	130	325	195	100	650
Danlando	2,90	58,00	145,00	87,00	43,50	290,00
Finnlando	2	40	100	60	30	200
Francio	2,20	44	110	66	33	220
FR Germanio	1,10	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00
Greklando	12	240	600	360	180	1200
Hispanio	36	720	1800	1080	540	3600
Hungario	8	160	400	240	120	800
Irlando	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Islando	120	2400	6000	3600	1800	12000
Israelo	5,5	110	275	165	85	550
Italio	400	8000	20000	12000	6000	40000
Japanio	110	2200	5500	3300	1650	11000
Jugoslavio	8	160	400	240	120	800
Kanado	0,64	12,80	32,00	19,20	9,60	64,00
Kolombio	15,2	304	760	456	228	1520
Korea Resp.	154	3080	7700	4620	2310	15400
Luksemburgo	16	320	800	480	240	1600
Meksikio	8	160	400	240	120	800
Nederlando	1,10	22,00	55,00	33,00*	16,50*	110,00
Norvegio	2,60	52,00	130,00	78,00	39,00	260,00
Nov-Zelando	0,46	9,20	23,00	13,80	6,90	46,00
Peruo	50	1000	2500	1500	750	5000
Portugalia	16	320	800	480	240	1600
Sud-Afriko	0,40	8,00	20,00	12,00	6,00	40,00
Svedio	2,30	46,00	115,00	69,00	34,50	230,00
Svislando	0,96	19,20	48,00	28,80	14,40	96,00
Urugvajo	1,20	24,00	60,00	36,00	18,00	120,00
Usono	0,56	11,20	28,00	16,80	8,40	56,00
Venezuelo	2	40	100	60	30	200
Resp. kup.	1,46	30	73	44	22	146

AM: Asocia Membro (koncernas nur aliĝintajn aŭ aliĝontajn landajn asociojn).

MJ: Individua Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*).

MA: Individua Membro-Abonanto kun Jarlibro kaj *Esperanto* (kaj, ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*).

SA: Simpla abono de *Esperanto*, sen membreco de UEA/TEJO.

Kto: Abono de *Kontakto*, sen membreco de TEJO.

SZ: Aldona sumo por membreco de Societo Zamenhof.

DM: Dumviva Membreco kostas 25 x MA (= 1375,00 gld.).

PT: Patrono de TEJO pagas duoble la abonon de *Kontakto* (33,00 gld.).

Esperanto-dokumentoj: 10 numeroj kostas duonon de MA (= 27,50 gld.).

UN kaj ni: 10 numeroj de tiu bulteno kostas duonon de MJ (= 11,00 gld.).

Bonvolu pagi al via landa kotizperanto (vidu la liston en Jarlibro 1978, p. 28-29). Nur la membroj en landoj sen kotizperanto pagu rekte al la Centra Oficejo, laŭ la tarifo en guldenoj, aŭ al sia plej proksima landa peranto.

*Por Nederlando aldoniĝas al la prezoj de simplaj abonoj (sen membreco) la imposto 4%.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

NORVEGIO: S. De Caspary.

SOCIETO ZAMENHOF 1978

BRAZ: 198 Elmo Pereira Nunes.
FRANC: 199 Roland Jossinet; 200 Jack-André Rousseau. FR GERM: 201 Hertha Franck. NOVZ: 202 Jeanie Wilson. US: 203 B.J. Balcar; 204 Margaret L. Barkley; 205 Thomas A. Goldmann; 206 Cecilia Peterson; 207 John P. Stitz; 208 Doris Vallon-Wheeler.

DONACOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 31a de julio

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo Ph. v.d. Lek-Muns 1 000,00. Sumo ĉi-jara: 28 714,13.

ELDONA FONDAĴO: Kanado: P. Larose 195,00.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: G. Pirlot 40,30. Japanio: K. Tubota 25,00. Nederlando: Anonime 1 500,00; R. Moerbeek 700,00. Sumo ĉi-jara: 2 632,66.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: Anonime 1 000,00; W. Rodenhuis 33,00. Sumo ĉi-jara: 1 857,22.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Belgio: Anonime 69,00; Gr. Maertens 69,00. Sumo ĉi-jara: 163,00.

ĜENERALA KASO: Belgio: G. Wolff 5 000,00. FR Germanio: Rüdiger Sachs 19,26; Traudel Benghsch 13,91. Irano: M.H. Saheb-Zamani 200,00. Nederlando: J.C. Heetkamp-Senstius 25,00; H.C. Timmer 10,00; J. Moerbeek 10,00; M. van Rees 100,00; R. Moerbeek 250,00. Nov-Zelando: J. Wilson 450,00. Svedio: E. Carlén 63,66. Diversaj malgrandaj: 37,69. Sumo ĉi-jara: 8 774, 61.

PATRONOJ DE TEJO, 1978: 18 J. Wilson, Nov-Zelando. 19 J. Verstraeten, Belgio.

AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Usono: Ralph L. Harry 334,88. Sumo ĉi-jara: 1 253,19.

DONACOJ 1978 (Gld.)

ĝis la 31a de aŭgusto

FONDAĴO CANUTO: F.R. Germanio: C. Tresorier 47,63. Sumo ĉi-jara 1 904,85

ĜENERALA KASO: Argentino: R. Calógero 18,90. Nederlando: A.W. van der Waal 50,00. Diversaj malgrandaj 15,16. Sumo ĉi-jara: 8 858,67.

PATRONOJ DE TEJO: 20 C. Darbellay, F.R. Germanio.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 21

(pri la demando vidu nian numeron de julio/aŭgusto)

a. La hungara kuracisto Kolomano Kalocsay (1891-1976) dum duona jarcento kontribuis al ĉiu faceto de la kultura vivo de Esperanto, ĉefe kiel tradukinto de poezio el diversaj lingvoj. *Rimportretoj* aperis en 1931. La citita rondelo priskribas Julion Baghy.

b. Julio Baghy (1891-1967), kiu laboris kiel aktoro, aktivis plurflanke en la Esperanto-movado, verkis poemojn, novelojn, romanojn kaj teatraĵojn kaj ankaŭ instruis Esperanton. "Al Ferenc Szilágyi" troviĝas en lia poemaro *Aŭtuna foliaro*, publikigita en 1970.

c. Francisko (Ferenc) Szilágyi (1895-1967) estis hungara bankoficisto, kiu elmigris al Svedio meze de la 1930aj jaroj. Tie li faris tre valorajn kontribuojn al la evoluo de la originala literaturo en Esperanto, verkante ĉefe novelojn kaj romanojn kaj redaktante la prestiĝan beletran revuon *Norda prismo*.

ĉ. La skota poeto estas William Auld (1924 -), instruisto pri literaturo kaj lernejestro. Li verkis originalan poezion en Esperanto, tradukis beletraĵojn el la angla kaj skota lingvoj kaj redaktis diversajn

Esperanto-eldonaĵojn. La cititaj versoj estas el la poemo "Memore al Ferenc Szilágyi".

d. "La poeto de la poetoj", Kolomano Kalocsay, en sia "Letero al William Auld" prikomentas *La infana raso*.

e. William Auld poezie korespondis kun Marjorie Boulton en 1953-1954. Liaj poŝtkartaj rondeloj aperis libroforme en 1976 sub la titolo *Rimleteroj*.

f. En "Malavara riĉulo", Marjorie Boulton (1934 -) omaĝis al Julio Baghy. Ankaŭ ŝi apartenis al la pedagogia profesio, estinte instruistino kaj direktoro de porinstruista altlernejo. Ŝiaj originalaj verkoj en Esperanto ampleksas preskaŭ ĉiujn ĝenrojn.

g. La titolo de la poemo de Julio Baghy estas "Letero al Kolomano Kalocsay".

DEMANDO 22

(la respondo aperos en nia novembra numero)

Lastatempe oni komencis pli ofte paroli pri la ekstereŭropigo de la Esperanto-movado. Ankaŭ tiu ĉi demando temas pri organizaj kaj kulturaj eventoj, kiuj okazis for de Eŭropo en dek diversaj urboj. Ĉu vi povas diveni la nomon de ĉiu urbo? Kaj ĉu vi povas trovi la komunan elementon, kiu kunligas ĉiujn okazaĵojn?

a. En 1888, nur unu jaron post la apero de la Unua Libro de d-ro Zamenhof, prestiĝa scienca organizaĵo, malaprobinte volapukon, interesiĝis pri Esperanto kaj publikigis eldonaĵojn pri ĝi. Kiel nomiĝas la societo, kaj kiu urbo estas ĝia sidejo?

b. En 1899 Wilhelm H. Trompeter, unu el la eminentaj pioniroj de la germana Esperanto-movado, vojaĝis al fora transmara lando, kie li renkontiĝis kun Richard H. Geoghegan, la unua brita esperantisto. Kie okazis tiu renkontiĝo?

c. Prof. Wilhelm Ostwald, fama germana kemiisto ĉe la Universitato de Lejpcigo kaj Nobel-premiito (1909), faris propagandon por Esperanto dum la lerneja jaro 1905-1906, kiun li pasigis kiel gastprofesoro ĉe bone konata eksterlanda universitato. Kiel nomiĝas la universitato, kaj en kiu urbo ĝi troviĝas?

ĉ. La unua traduko en Esperanton de la *Komunista manifesto* de Karl

Marx kaj Friedrich Engels aperis en 1908. Kiu tradukis ĝin, sub kiu titolo kaj en kiu urbo ĝi estis eldonita?

d. La Internacia Somera Universitato (ISU) fariĝis parto de la programo de Universalaj Kongresoj de Esperanto la unuan fojon en 1925 ĉe la 17a Kongreso en Ĝenevo. La iniciatinto de ISU estis Edmond Privat, kiu ricevis la ideon pri ĝi dum eksterlanda prelegvojaĝo en 1908. Kie li estis?

e. Kie okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en ekstereŭropa lando?

f. La 10a Universala Kongreso ne povis okazi en Parizo en 1914 pro la eksplodo de la unua mondmilito. La sekva kongreso estis aranĝita ekster Eŭropo. Kiu urbo gastigis la malmultajn esperantistojn, kiuj povis ĉeesti la 11an UK en 1915?

g. La unuaj radio-disaŭdigoj en Esperanto okazis en 1922 en du malproksimaj urboj. Unu el tiuj

urboj estis Londono. Kiu estis la alia urbo?

ĝ. Jozefo Silbernig, unu el la bofratoj de d-ro Zamenhof, elmigris el Eŭropo kaj ekloĝis en granda urbo, kie li fariĝis delegito de UEA. Kiel nomiĝas la urbo?

h. Jam estis menciitaj en tiu ĉi demando du ekstereŭropaj Universalaj Kongresoj. Ankaŭ en 1972 multaj kongresanoj devis vojaĝi al alia kontinento. Kie estis organizita la 57a UK?

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo respondecas nur la anoncantoj mem.

Prof. Gaston Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, havas novan adreson: Tour Tokyo — App. 1251, 20 avenue d'Ivry, F-75645 Paris Cedex 13, Francio. La adreso jam ekvalidis.

26-jara dentisto, d-ro Mohamad Pezeshki, Kh. Narvan, Kh. Shirokhorshid, Karj, Irano, deziras korespondi tutmonde.

Finna klasikaĵo *La kanto pri fajr-ruga floro* de Johannes Linnankoski, 131 p., formato B5, prezo 30 fmk aŭ egalvaloro, ricevebla ĉe Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10.

Sav-armeanoj volas korespondi tutmonde. Eason, 11 Walker Road, Cardiff, Kimrujo.

Interŝanĝus ilustritan priskribon de tradiciaj festoj, ludoj, infankantoj: Esperanto-Grupo, Scuola Media Garibaldi, I-16043 Chiavari, Italio.

Naturistoj / Nudistoj, ankaŭ en ne-transpagipovaj landoj! Aliĝu al INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista)! Petu informojn kaj aliĝilon de H. Welger, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Atentu, metallaboristoj! Sindikata klubo en Svedio, loko proksime de Gotenburgo, atendas pruvon pri la avantaĝo de Esp. inter sindikatoj. Skribu, ni petegas, por instigi niajn membrojn partopreni kursojn por komencantoj. Se vi deziras korespondi, diru tion. Ni respondos al vi. Adresu: Metallaborista Klubo ĉe Kompanio ATLET AB, Pf. 138, S-435 01 Mölnlycke, Svedio.

Klubo de la inventistoj serĉas helpon, eble universitata nivelo, pri teknikaj problemoj koncernantaj novajn ideojn por starigi industriproduktoman Esperantan komunumon. Inventistoj, lernistoj aŭ ĉiu kiu deziras scii aŭ partopreni, povas peti informojn al: UNIVERSALAJ GEVIROJ, Box 607, Saipan, Mariana Islands 96950 U.S.A. Tuj oni bezonas informojn pri malgranda vaporturbino, preskaŭ 10 ĉp.

Internacia aktuala revuo serĉas KUNLABORANTOJN en ĉiuj landoj. Bezonataj estas ĵurnalistoj, korespondantoj, sciencistoj, fakuloj el ĉiuj kampoj, novelistoj, poetoj, karikatelistoj. Se vi havas intereson, dekomence kunlabori ĉe ambicia projekto, turnu vin al: Stefan Maul (SEM-AJNO), Singerstr. 1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Ricevu liston de senkopirajtaj teĥnikaj artikoloj. Skribu al ELA, P.O. Box 17627, Ft. Worth, TX 76102, USA/Usono.

Optimala Esperanto-Ortografio de A. Lienhardt. Ebligas elimini la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, kaj apliki q, w, x, y bezonatajn en sciencoj. Prezo: 9,00 gld. Libroservo de UEA (aŭ ĉe la aŭtoro: 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse, Francio).

Bildkartojn deziras interŝanĝi tutmonde Ray Jones, 3024 Valley Forge Trail, Fort Worth TX 76140, USA/Usono.

Infor-Jeunes (Junulara Informado) petas ĉiajn informojn por kaj pri junularo pere de Esperanto. Skribu al: Eduard Julemont, Rue de Liège 62, B-4800 Verviers, Belgio.

Araba eldono de la libreto *Vastaj Horizontoj* tre urĝas por ni, sed tro malfacilas. Kiu helpos nin? Ni pardonpetas al la kongresanoj en Varna, ke nia kunveno tie ne okazis. La koncerna sciigo bedaŭrinde ne atingis vin! Skolta Esperanto-Ligo, postbus 433, 1500 EK Zaandam, Nederlando.

20-jara fraŭlino serĉas korespondamikojn tutmonde: Farideh Massoumzadeh, 95 Massoumzadeh Alley — 15 Alley, Ave. Abusaid, Tehran, Irano.

UNU MONDO — UNU LINGVO — UNU MONO

Jen sloganforme la filozofio per kiu tiuj pioniroj en la mallumaj tagoj post la dua mondmilito donis animon al la jam ekzistanta asocio de Esperantistoj, UNIVERSALA LIGO.

La filozofio ankoraŭ validas, kaj la Ligo ankoraŭ ekzistas.

Per stabiligo por ĉiam de la valoro de la internacia monunuvo, la Stelo, la Ligo lastatempe prenis decidan paŝon survoje al atingo de la praktika celo; ĝi nun bezonas pli vastan subtenon de uzantoj de la internacia lingvo.

Se vi ernas labori por mondpaco per tutmonda unuiĝo, petu nun ekzempleron de la Statuto de la Ligo kaj aliajn detalojn, de Universala Ligo (R), P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando. (Enmeto de irpk, se eblas, estas petata).

Ĉina monata gazeto en Esperanto



varbas abonantojn de 1979

Periodo de abonvarba kampanjo: Ekde la 1-a de oktobro 1978 ĝis la 31-a de januaro 1979. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la varb-kampanjo, povos senpage ricevi unu ekz. de grandformata kolora kalendaro en Esperanto.

Abonprezoj: Por 1 jaro: Gld. 7,00; por 2 jaroj: Gld. 10,50; por 3 jaroj: Gld. 14,00.

Abonvarbado estas bonvena. La abonvarbanto sendu la kolektitajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel varbanton. Oni ankaŭ povas sendi ilin rekte al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN. Post plenigo de la aboniloj la abonvarbanto povos ricevi memoraĵojn kun ĉina stilo.

Abonu ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto:
Esperanta Sekcio de GUOZI SHU-
DIAN. P.O. Kesto 313. Pekino, Ĉinio
Specimeno akirebla ĉe la ĝenerala distribuanto.

d-ro Jozef Hartl, a 1010 viin
franc Jozefs kĥee 31 (int.abc)
poŝtgirkonto 7 503.218

ĵus aperis n-ro **5**
projekto de
racia nacia monsisistemo
evitos senlaborecon kaj
de mono kaŭzitan inflacion
öS 54.- aŭ 9 int.resp.kup.,
mendebla ankaŭ ĉe uea

Niaj klientoj estas kontentaj...

Niaj klientoj scias ja, ke ni rapide kaj akurate liveras ĉiajn presaĵojn: revuojn, prospektojn, faldfoliojn...

Ili scias ja, ke ĉe ni tekstoj en la svahila, la ĉeĥa aŭ la dana estas same senriproĉe kompostitaj kiel en Esperanto...

Sed krome niaj klientoj scias, ke la (malgranda) gajno kiun ni perlaboras, rekte eniras la kapitalon de UEA kaj ke ili subtenas la movadon donante siajn preslaborojn al ni.

Informojn pri viaj presaĵoj volonte donas
Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio
Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen (Belgio)
Specialaj rabatoj por membroj de UEA.

EL LA TREZOROJ DE ESPERANTO:



Kompleta kolekto, de la unua ĝis la lasta numero, de tiu interesege kultura revuo, antaŭrevolucie aperinta en Moskvo, zorge konservita sur mikrofilmoj en poŝtkarta formato, laŭ internacia normo. Se vi ne disponas pri la necesa lego-aparato, tia estas aĉetebla je modera prezo, pere de nia eldonejo.
Prezo por la kompleto de 17 mikrofilmoj, kun ĉ. 1 500 paĝoj, nur 985,00 belgaj frankoj, pagenda al nia belga poŝtĉekkonto 000-0422856-33.

Pliaj mikrofilmaj kolektoj estas planataj.



**Heideweg 20
B-2120 Schoten, Belgio**



Swissair portas
la mondon
al Svislando
kaj Svislandon
al la mondo.

Oficiala flugkompanio de la 64a UK

